HUNGARA VIVO

3
1985
16,- Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemoraĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Vaskó Tibor. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség Házi Sokszorosítójában. Felelős vezető: Szabó Imre. Budapest, 1985. július. Törzsszám: hearota 85-021[illegible]. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben ös a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft , fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
VIII.Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVa jaro, 1985 n-ro 3
(121)

ENHAVO

Sincero kaj demokratio 82
Brecht, B.: Sed kiu ja estas la Partio? *(V. Benczik)* 83
László I.: Departemento Somogy 84
Teatraj vesperoj en Budapeŝto 86
Štimec, S.: Marto sen Gabi Jobba 89
Szabó I.: Senorda raporto (Omaĝe al Lajos Kökény) 90
Ducent horoj trans la Granda Muro 91
Fenyvesi E.: Betjaroj surĉevale 94
Moldova Gy.: La semaforo *(I. Szabó)* 98
Hungara poezio 99
Panoramo 100
Revuo de revuoj 103
Bálint, Sz.: Poligamio 104
László, I.: Leo Weiner (1885-1960) 105
Nemere I.: La trezoro 3. 106
Bessenyei T.: Sagacaj antikvuloj 107
Korĵenkov, A.: Sciencfikcie el Uralo 108
Mozaiko el Esperantujo 110
Novaj elektronikaj instrumentoj 112
Recenzoj 115
Fenyvesi E.: Gaja paĝo 117
Leterkesto, Korespondi deziras 118
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 119

Sur la frontpaĝo: Katalin Berek kaj Zoltán Gera en sceno el la teatraĵo „La Damo de l' Fatalo" de László Tabi. Foto de Zoltán Fejér.

Iom malfrue...

la dua numero atingis la abonantojn, kaj kredeble ankaŭ tiu ĉi kajero alvenos ĉe Via leterkesto semajnojn post la kutima dato. Pardonu! Rekompence ni promesas ĝustatempe – t.e. tre baldaŭ ekspedi al Vi la kvaran numeron.

La artikoloj sur la sekvaj paĝoj raportas pri diversaj eventoj, okazintaj inter martomezo kaj majofino. La ĉefa el tiuj estis sendube la 13-a Kongreso de Hungara Socialisma Laborista Partio, kiu kunsidis en Budapeŝto fine de marto. Tiu ĉi Kongreso difinis la ĉefajn liniojn de la evoluo de Hungario dum la sekvontaj kvin jaroj.

En marto denove okazis Budapeŝta Printempa Festivalo, kaj enkadre de tiu prestiĝa aranĝo esperantistoj povis spekti interesajn teatrajn prezentadojn dum la 3-a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj. Kiel legeblas en nia raporto, estis bonaj prezentadoj, sed foje-foje iom malmultaj spektantoj...

En majo trafis dolora perdo la esperantistaron, kaj speciale nian revuon: mortis Ludoviko Kökény, kiu inter siaj sennombraj kontribuoj al la Esperanta kulturo estis ankaŭ la unua ĉefredaktoro de Hungara Vivo. Imre Szabó per bela poemo omaĝas al la memoro de tiu forpasinta batalinto de nia Movado.

Ervin Fenyvesi artikolas pri „betjaroj", klarigante ankaŭ la socian fonon de la fenomeno, kiu en kiĉaj imagoj fariĝis kvazaŭ la simbolo de Hungario.

Aperas ĉinumere la unua parto de la Ĉinia vojaĝraporto de Vilmos Benczik: temo tre aktuala, ja restas nur unu jaro.ĝis la 71a UK en Pekino.

Interesa intervjuo el Sovetio raportas pri la disvolviĝo de la sciencfikcia literaturo en Uralo, sur la limo inter Eŭropo kaj Azio. La ŝatantoj de la pli tradicia literaturo trovas en tiu ĉi numero poemojn kaj novelon tradukitajn el la hungara lingvo.

Krome aperas la kutima daŭrigenda rakonto – tion ekde nun oni trovos en ĉiu numero –, plia epizodo de la felietona romaneto de Nemere, ni prezentas la departementon Somogy, kaj kompreneble ne mankas ankaŭ la kutimaj rubrikoj...

Ĉu enhavo taŭga por feria sezono – tion decidu Vi mem!

SINCERO KAJ DEMOKRATIO

Inter la 25-a kaj 28-a de marto de 1985 en la nova Kongresa Centro de Budapeŝto kunsidis la 13-a Kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio. La kunvenintaj 935 delegitoj reprezentis 870 992 partiajn membrojn – tio signifas, ke ĉ. ĉiu naŭa plenkreska hungara civitano estas membro de la Partio.

La unua tagordo de la kongresa programo estis la debato de la skriba raporto de la Centra Komitato. Tiun ĉi raporton buŝe kompletigis János *Kádár,* la unua sekretario de la CK. Li raportis, ke la antaŭe publikigitajn kongresajn tezojn la membraro debatis en ĉiuj – entute 25 000 – bazaj organizaĵoj, kaj tiu ĉi debato estis malkaŝa kaj sincera. La unua sekretario konstatis, ke la evoluo de la lando dum la pasintaj kvin jaroj okazis en la spirito de la Rezolucio de la 12-a Kongreso, kaj la reeĥoj al la kongresaj tezoj pruvas, ke la partia membraro deziras esence la daŭrigon de la ĝisnuna politiko. Li petis la Kongreson konsideri, ke la Centra Komitato dum la interkongresa periodo firme laboris por la efektivigo de la Rezolucio de la 12-a Kongreso, eĉ se ne sur ĉiu kampo ĝi sukcesis plenumi la taskojn starigitajn en tiu Rezolucio.

La Rezolucio de la 12-a Kongreso metis du ĉefajn celojn: la konservon de la internacia pagkapableco de Hungario kaj la konservon de la jam atingita vivnivelo.

La unua celo estis plene atingita, Hungario restis pagkapabla, kaj dum la kvar jaroj inter 1981-84 nia lando sukcesis malkreskigi siajn ŝuldojn je 15%. Dum tiuj ĉi kvar jaroj la industria produktado kreskis je 10,2%, la agrikultura produktado je 12,4%. La kresko de la nacia enspezo kreskis je 8,5%.

Koncerne la duan celon, oni povas diri, ke la konsumado fare de la loĝantaro kreskis je 6% dum la nomita periodo. Tamen, la reala salajro malkreskis, kaj iuj tavoloj de la socio devis sperti la malboniĝon de sia vivnivelo.

János Kádár emfazis, ke la celo de la Partio estas rimarkeble altigi la vivnivelon, sed tio eblas nur surbaze de la farita laboro: distribui eblas nur tion, kion oni produktis. Nur la produktado, efika kaj konscience farata laboro povas esti la bazo de pli alta vivnivelo. Li raportis, ke en la sekva kvinjara plano (1986-90) oni antaŭvidos 14-17%-an altiĝon de la nacia enspezo, 13-16%-an altiĝon de la industria produktado kaj 12-14%-an altiĝon de la agrikultura produktado. La enlanda utiligo de la nacia enspezo povos kreski je 13-16%.

Fine de sia buŝa kompletigo al la skriba raporto de la CK, okaze de la 40-a datreveno de la liberiĝo de Hungario la unua sekretario de la CK esprimis sian dankon al la sovetaj herooj, kiuj portis la liberecon por la hungara popolo, al la kunbatalintaj bulgaraj, jugoslavaj kaj rumanaj soldatoj, kaj al ĉiuj soldatoj de la armeoj de la kontraŭfaŝisma alianco, kiuj batalis por la libereco de Hungario.

La raporton de la Centra Kontrolkomitato prezentis al la Kongreso ĝia prezidanto, András *Gyenes.* En sia buŝa kompletigo li substrekis, ke la partia disciplino dum la lasta periodo fortiĝis, la plimulto de la partia membraro laboras kaj kondutas modele, per tio fortigante la prestiĝon de la Partio antaŭ la socio. Tamen, ankoraŭ troviĝas partianoj, kiuj klopodas tiri avantaĝon el sia posteno, aŭ alimaniere pekas kontraŭ la partia disciplino. Tiajn membrojn la Partio adekvate punas, kaj se necese, eksigas ilin el la Partio. Dum la lastaj kvin jaroj estis eksigitaj el la Hungara Socialisma Laborista Partio 7639 personoj, 0,9 procentoj de la membraro.

En la debato de la du raportoj anoncis sin por alparolo 199 delegitoj – pro tempomanko povis paroli nur 58 kongresanoj, la ceteraj prezentis sian alparolon skribe. La alparolintoj akceptis la ĝeneralan politikan linion de la Partio, deziris ĝian daŭrigon, sed faris ankaŭ multajn konk-

Parolas János Kádár

La partoprenantoj de la Kongreso



retajn rimarkojn pri pluraj punktoj de la raporto de la CK. Tiuj rimarkoj direktiĝis unuavice al certaj fenomenoj, fontantaj el la ekonomiaj reformoj, kiuj dum la lastaj jaroj estis enkondukitaj en Hungario. Multaj delegitoj esprimis sian opinion, ke la laboruloj devas havi eblon perlabori adekvatan salajron dum la normala labortempo, sen ekstraj horoj. Pluraj alparoloj tuŝis la problemon de personoj, havantaj malaltan pension: en la nuna momento tiuj pensiuloj estas la tavolo, kiu havas la plej malfacilajn vivkondiĉojn en Hungario. Aliaj delegitoj urĝis pli intensan ŝtatan subtenon por la gejunuloj, nun fondantaj familion.

La debaton resumis János Kádár. Fiere li konstatis, ke 63,5% de la kongresaj delegitoj estas personoj, kiuj posedas altlernejan aŭ universitatan diplomon, kaj 10% de la kongresanoj eĉ sciencan gradon. „Ankaŭ tiuj ciferoj montras la grandegan evoluon de nia partio kaj socio. Estas grandioze, ke ni atingis tion" – li diris.

Li esprimis sian ĝojon pro la sincera kaj malkaŝa diskuto, kiu ne evitis tuŝi la problemojn, kiuj reale ekzistas en la hungara socio. Tiu diskuto pruvis, ke en la Partio vivas demokratio, kaj ke la delegitoj prenis serioze sian taskon. Li konsentis ankaŭ pri la neceso plibonigi la socialan situacion de pluraj tavoloj de la popolo – sed substrekis ankaŭ tion, ke tiu plibonigo dependas ne de iu decido, sed de la rimedoj necesaj, kiuj kreeblas nur per konscienca laboro.

Post la resumaj vortoj de János Kádár la Kongreso akceptis du dokumentojn: „Rezolucion de la 13-a Kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio pri la laboro de la Partio kaj pri la pluaj taskoj" kaj la „Statuton de la Hungara Socialisma Laborista Partio."

La Rezolucio grupigas la taskojn en kvin ĉapitroj: 1. Internacia situacio, ekstera politiko; 2. Interna politiko, sociaj kaj politikaj rilatoj; 3. Ekonomio; 4. Vivnivelo, vivkondiĉoj, socialpolitiko; 5. Ideologio, kulturpolitiko, socialisma vivmaniero; 6. La Partio kaj la amasorganizaĵoj; 7. La internacia agado de la Partio.

La ĉapitroj de la Rezolucio pledas por la daŭrigo kaj la evoluigo de la ĝisnuna politiko. Ĝi antaŭvidas la daŭrigon de la ekonomiaj reformoj, kaj surbaze de la atingota pli alta nacia enspezo la altigon de la vivnivelo, plibonigon de la vivkondiĉoj de la loĝantaro. Ĝi substrekas la neceson de tio, ke la Partio daŭre konservu la fidon de la popolo, ĉar tiu fido estas la plej firma garantio por la sukcesa plenumo de la difinitaj taskoj.

La nova statuto de la Partio nuligis la funkcion *unua sekretario de la CK,* kaj kreis du novajn funkciojn: *ĝenerala sekretario de la CK* kaj *anstataŭanto de la ĝenerala sekretario de la CK.*

Surbaze de la nova statuto la Kongreso elektis la gvidajn organojn de la Partio. La nova *Centra Komitato* havas 105 membrojn (la antaŭa havis 127 membrojn), inter ili troviĝas 76 reelektitaj kaj 29 novaj membroj. La nova *Politburoo* havas 13 membrojn (kiel ankaŭ la antaŭa), inter kiuj tri personoj estas novaj membroj: Károly *Grósz,* unua sekretario de la Budapeŝta Partia Komitato, Csaba *Hámori,* unua sekretario de la CK de Hungara Komunisma Junulara Asocio, kaj István *Szabó,* prezidanto de la Nacia Konsilio de Agrikulturaj Kooperativoj. La Centra Komitato elektis ses sekretariojn: János *Berecz,* Ferenc *Havasi,* István *Horváth,* Miklós *Óvári,* Lénárd *Pál* kaj Mátyás *Szűrös.* Krom Ferenc Havasi kaj Miklós Óvári la ceteraj estas novaj en sia funkcio. Kiel anstataŭanto de la ĝenerala sekretario estis elektita Károly *Németh.* Ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Partio estis elektita János *Kádár,* kiu jam preskaŭ 29 jarojn gvidas la partion de la hungaraj komunistoj je la bono de la tuta popolo.

*

Bertolt Brecht
(1898–1956)

Sed ja kiu estas la Partio?

Sed ja kiu estas la Partio?
Ĉu ĝi sidas en granda domo, ĉirkaŭita de telefonoj?
Ĉu ĝiaj pensoj estas sekretaj, kaj la decidoj nekonataj?
Kiu estas la Partio?

La Partio estas ni.
Vi kaj mi – ni ĉiuj.
Tie ĝi spiras en viaj vestoj, tie ĝi pensas en via kapo.
Ĝia domo estas tie, kie mi loĝas, kaj ĝi batalas tie, kie oni atakas vin.

Montru la vojon, kiun ni devus iri,
kaj ni iros kune kun vi sur ĝi, sed
ne iru sen ni sur la ĝusta vojo,
ĉar sen ni ĝi estas falsa vojo,
ne forŝiriĝu de ni!
Ni povas erari, kaj vi povas pravi,
do ne forŝiriĝu de ni!

Ke la mallonga vojo estas pli bona ol la longa, tion neas neniu,
sed se iu konas ĝin,
kaj tamen ne montras ĝin al ni, kiom valoras ties saĝo?
Estu saĝa kun ni!
Ne forŝiriĝu de ni!

Tradukis: Vilmos *Benczik*

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Somogy

Jen Transdanubia departemento, kies plej karakteriza turisma specialaĵo, samtempe altirforto estas la „Hungara maro": Balatono. La departemento situas ĉe la suda bordo de la lago kaj etendiĝas suden ĝis la hungara-jugoslava landlimo. La teritorio de la departemento abundas je mez-altaj montaroj, je pitoreskaj arbaroj, kies sovaĝa bestaro ofertas riĉajn trofeojn por la enkaj eksterlandaj ĉasistoj. Tamen la plej alloga parto de la departemento ligiĝas al la bordo de Balatono, pro la agrablaj ripozebloj kaj la diversaj sportebloj, kiujn la hungara maro ofertas por la ŝatantoj de la akvaj sportoj, somere kaj vintre.

Estas menciinde ke la bordojn de la 70 km-jn longa Balatono naŭdek procente posedas du departementoj: norde departemento Veszprém kaj sude departemento Somogy (Ŝomodj). Pri la norda bordo ni raportis pasintjare en la kadro de artikolo pri departemento Veszprém. Estante iom da diferenco inter la ebloj de sinbanado, tiu diferenco sendube signifas avantaĝon por la suda, Somogy-a bordo. Nome la fundo de la lago ĉe la suda bordo, sternita per fajna sablo, estas malpli profunda, ol tiu ĉe la norda bordo. Konsekvence ankaŭ la temperaturo de la akvo estas pli milda kaj ĉio ĉi signifas pli konvenajn cirkonstancojn, precipe por la infanoj.

Nu, ni komencu nian trarigardon ĉe la Balaton-a bordo. La unua urbo de la lagobordo estas *Siófok* (Ŝiofok). Ĝi fariĝis urbo en 1969, havas 25 000 loĝantojn, samtempe estas la plej vigla, plej frekventata ripozejo de la lago kaj de la departemento. Dum la pasintaj du jardekoj okazis tie granda konstruado kaj tie oni elformis la plej vastan hotelgrupon de la ĉirkaŭaĵo. Hodiaŭ Siófok estas la suda urbo de la departemento. Ĝi fariĝis granda centro de la organizita ripozigo pere de la sindikatoj kaj entreprenoj. Konsekvence la urbo fariĝis populara centro ankaŭ por la internacia turismo. La ripoz- kaj bankolonio de la urbo etendiĝas 15 km-jn laŭlonge de la lagobordo. Siófok estas naskiĝloko de la fame konata operetkomponisto Imre *Kálmán.*

Pluirante laŭ la bordlinio de la lago ni atingas same viglatrafikan ripozejon: *Balatonföldvár* (Balatonfeldvaar). Malgraŭ tio, ke ĝi havas nur 2000 loĝantojn, tamen ĝia vilao-kvartalo konstruiĝis jam dum la fino de la deknaŭa jarcento. Oni elformis ĝin moderne kun grandampleksaj parkoj kaj promenejoj. De la agrabla, aleoriĉa promenejo en belega panoramo videblas la proksima duoninsulo de la transa flanko Tihany (Tihanj) kaj malantaŭe la montarvico de la nord-Balatona ĉirkaŭaĵo.

Somogyvár (Ŝomodjvaar) estas granda vilaĝo, iam dum 600 jaroj centra urbo de la departemento. Ĉirkaŭ la jaro 1090 la tiama reĝo fondis tie abatejon kaj konstruigis grandan bazilikon, krome burgon. Por hodiaŭ restis el tiuj nur ruinoj.

Marcali situas en la nordokcidenta angulo de la departemento kaj oni deklaris ĝin urbo en 1977. La juna urbo disponas pri pluraj valoraj artobjektoj, memorigantaj pri la elstaraj figuroj de la plej nova historio.

Nagyatád (Nadjataad) estas same juna urbeto, sed disponante pri konvena termobanejo, ĝi havas specialan allogan forton por tiuj, kiuj ne povas facile atingi Balaton-on.

Apud la lagobordo krom la menciitaj ankoraŭ *Boglárlelle* kaj *Fonyód* (Fonjod) estas viglatrafikaj ripozejoj. Boglár kaj Lelle origine estis memstaraj banlokoj. Pro la proksimo kaj la ur-

Panoramo de Kaposvár



La plaĝo en Siófok

banizaciaj vidpunktoj maturiĝis la kondiĉoj ke oni unuigu la du viglatrafikajn vilaĝojn.

Fonyód estas la plej malproksima banloko de la suda bordo, kalkulante de Budapeŝto. Laŭ la evoluigaj planoj de la regiono, post Siófok ĝi fariĝos la plej granda ripozejo, kaj konforme al tio, oni planis la komunumajn servojn kaj plaĝojn por 7 km-jn longa bankolonio.

En la suda regiono, proksime al la lago ni trovas la memorindan lokon de la iama popolarto: vilaĝon *Buzsák* (Buĵaak). Ĉar en la vilaĝo ĉiam pli elĉerpiĝas la popolarkitekturaj memoraĵoj, oni instalis en 1976 konstantan ekspozicion pri la historio de la loka popolarto.

La administra centro de la departemento estas *Kaposvár* (Kapoŝvaar), kies loĝantaro iom superas 70 000. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo alternas montetoj kaj artefaritaj lagoj, kiuj faras eĉ pli varia la ekskursejojn de la regiono.

La unua historia mencio pri la urbo okazis ĉ. 1009. Kaposvár apartenas al tiuj rapide evoluintaj urboj, kies stratoj evidente montras la laŭplanecon de moderna urbo. La ĉirkaŭaĵo ofertas riĉajn eblojn pri ekskursoj. La sudoriente situanta regiono, laŭnome Zselicség (Ĵelic-regiono) estas speciale riĉa je arbaroj. La popolo de la tie troviĝantaj vilaĝoj havas specialan artospecon, la lignoskulptadon.

La E-movado en la departemento ne havas profundajn radikojn. La tuta nuntempa esperantistaro nombras ĉ. 80. En Kaposvár funkcias 3 grupoj. Pasintjare oni instruis la internacian lingvon por 15 infanoj kaj 84 plenkreskuloj.

La esperantistoj de Kaposvár havas konstantan interrilaton kun la membroj de la Naturamika Societo. Ili konstruis kune kun ili turisman domon. Simile ili komune eldonas turismajn propagandilojn E-lingve. Ĉijare la Departementa Komitato planas aranĝi kampadejon en Fonyód por esperantistaj pioniroj.

István *László*

Popolkostumoj de Buzsák

TEATRAJ VESPEROJ EN BUDAPEST

Post unujara paŭzo en 1984, ĉijare Esperanto denove trovis lokon en la programo de la Budapeŝta Printempa Festivalo: inter la 22-a kaj 26-a de marto estis aranĝita en la hungara ĉefurbo la 3-a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj. Konvene al la bazaj celoj de la Budapeŝta Printempa Festivalo la ĉefa emfazo denove estis donita al la prezentiĝo de la hungaraj geaktoroj; partoprenis la programaron nur unu eksterlanda trupo: Bulgara Esperanto-Teatro.

Iom malsimile al la pli fruaj jaroj, la Renkontiĝo nun daŭris nur kvin tagojn. Dum tiuj kvin tagoj okazis sep prezentadoj de ses teatraĵoj en la Teatro „Miklós Radnóti", kiu estas jam kvazaŭ tradicia ejo por la Budapeŝtaj Esperantaj teatraj aranĝoj.

Maria Angelova en la parada revua vespero

D-ro Endre Baráth (maldekstre) malfermas la Renkontiĝon. Dekstre de li staras Ágnes Pataki kaj Vilmos Benczik

Inaŭguro

La unua prezentado okazis la 22-an de marto, vespere. Kiel dum la pasintaj jaroj, Baldur *Ragnarsson,* la estrarano de UEA pri kulturo, denove sendis salutleteron al la Teatra Renkontiĝo, kiun laŭtlegis Ágnes *Pataki.* Post la prezento de tiu letero d-ro Endre *Baráth,* parlamentano, la ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio oficiale malfermis la 3-an Internacian Renkontiĝon de Esperantaj Teatroj. Fine de la oficialaj formalaĵoj povis komenciĝi la arta programo. Dum tiu ĉi vespero la publiko povis vidi la scenejan adaptaĵon de la novelo de Franz *Kafka: Letero al la Akademio* kaj la unuaktaĵon *Betonterapio* de János *Elem.*

Letero al la Akademio estas monodramo, en kiu simio raportas al la Akademio pri tio, kiel ĝi homiĝis. La rolon de la simio ludis brile Kálmán *Szabó,* kiu pli frue jam montris siajn elstarajn kapablojn ludi sola en *La lasta magnetofonbendo de Knapp,* verkita de Samuel *Beckett.* Lia Esperanto estis senriproĉa, malgraŭ la sendube grandega fizika fortostreĉo paroli el sub peza masko. La tradukon faris Jozefo *Horváth.*

La dua ero de la vespero estis *Betonterapio* de János *Elem,* kies unua teatraĵo *Ĉu vi vidis jam la piedsignojn de l' Profeto?* estis okfoje prezentita antaŭ esperantista publiko, kaj ĝin vidis entute 8000 personoj – tio estas verŝajne rekordo por teatraĵo en Esperanto. La agado de *Betonterapio* okazas en frenezulejo, ĝiaj rolantoj estas la sennomaj Fleganto kaj Flegato. La publiko povis sperti, kiel iom post iom

Mihail Ĉobanov deklamas (Fotoj de Z. Fejér)





Péter Kertész kaj István Pathó en „Betonterapio"

La publiko ĉe la premiero de „Betonterapio"

la aplomba Fleganto perdas sian superecon kaj Flegato tute superregas lin. Péter *Kertész* (Fleganto) kaj István *Pathó* (Flegato) – ambaŭ nun debutantaj antaŭ esperantista publiko – ludis eminente: ili sukcesis trafe bildigi la foje-foje iom abstraktan, tro filozofian tekston. La publiko – inkluzive la eksterlandanojn – estis frapita precipe de la senmakule perfekta Esperanta prononco de Péter *Kertész*. La teatraĵon reĝisoris Kálmán *Szabó*, esperantigis ĝin Péter András *Rados*. (*Betonterapio* aperis ankaŭ libroforme, en dulingva – hungara-Esperanta – eldono.)

Letero al la Akademio kaj *Betonterapio* havis ankaŭ duan prezentadon la 24-an de marto, vespere.

Pupteatro – ĉiam populara

La 23-an de marto posttagmeze okazis pupteatra prezentado: la trupo de la Hungara Ŝtata Pupteatro prezentis denove la adaptaĵon de la versa popolfabelo de Sándor *Petőfi: Johano la Brava*. Kvankam tiu ĉi teatraĵo aperas ne la unuan fojon antaŭ la esperantista publiko, ĉiuj biletoj estis foraĉetitaj

Sceno el „La milionulo" de Jordan Jovkov



Zoltán Gera kaj Katalin Berek en „La Damo de l' Fatalo"

jam semajnojn antaŭ la prezentado. Kompreneble, tiun ĉi teatraĵon spektis plejparte infanoj, tamen, ne nur ili: inter la publiko oni povis vidi ankaŭ multajn „seriozajn" plenkreskulojn, kiuj ekscitite sekvis la aventurriĉan agadon. Tiu ĉi teatraĵo en Esperanto kompreneble ŝuldas sian ekziston al la elstara esperantista pupartisto Roberto *Bánky*.

Budapeŝta komedio

La saman tagon vespere okazis la Esperanta premiero de la komedio *La Damo de l' Fatalo* de la hungara teatra aŭtoro László *Tabi*. *La Damo de l' Fatalo* estas ĝisoste Budapeŝta komedio verkita kun perfekta dramaturgio, memoriganta pri la komedioj de la fama hungara dramisto Ferenc *Molnár*. La protagonisto estas emerita Budapeŝta ĉefprokuroro, vivanta dum jardekoj simple kaj puritane, kiu en la aĝo de sesdek kvin jaroj decidas iel ajn riĉiĝi. Helpe de gazetanonco li trovas riĉan vidvinon – dufojan vidvinon! – pri kiu tamen evidentiĝas, ke ŝi mortigis ambaŭ siajn edzojn. Kion fari do? Ĉu rezigni pri la havaĵo? Nia prokuroro decidas ne rezigni... kaj tiu decido rezultigas serion da ridigaj scenoj ĝis la tragikomika fino.

La duopon de la emerita prokuroro kaj de la dufoja vidvino ludis eminente Zoltán *Gera* kaj Katalin *Berek*, kiuj jam plurfoje pruvis sian elstaran talenton kaj lingvan kompetentecon antaŭ la esperantista publiko. Tamen, ĝis nun ni vidis ilin en nur seriozaj teatraĵoj – nu, en *La Damo de l' Fatalo* ili pruviĝis ankaŭ elstaraj komikaj geaktoroj. Ili perfekte regis sian tekston, kaj krom tio spicis sian ludon per amaso da ridigaj eltrovaĵoj. Ildikó *Pécsi* ludis memorinde la rolon de kverelema maljuna sinjorino. Zsuzsa *Szilágyi* vivigis tre agrable la filinon de la prokuroro, kaj István *Wohlmuth* same ŝatinde la figuron de senaplomba juna ĵurnalisto.

La publiko preskaŭ senhalte ridis dum la tuta prezentado: dank' al la bona teatraĵo kaj la bonege ludantaj geaktoroj ĝi travivis tre agrablan vesperon. La teatraĵon reĝisoris László *Kelemen*, la tradukon faris Vilmos *Benczik*. (Ankaŭ tiu ĉi teatraĵo aperis libroforme, kaj ĝi mendeblas ĉe ĉiuj libroservoj.)

La Damo de l' Fatalo estis ripetita la 25-an de marto vespere, kun same granda sukceso.

Bulgara gastludo

La programo de la posttagmezo de la 24-a de marto estis la komedio *La milionulo* de la bulgara klasikulo Jordan *Jovkov* (1880–1937) en la prezento de Bulgara Esperanto-Teatro, gvidata de Kunĉo *Vâlev*.

La agado de la tre amuza komedio disvolviĝas en provinca urbeto, kien alvenas granda sumo por iu doktoro Kondov. La monavidaj eturbaj sinjoroj kredas, ke la adresito estas la urba veterinaro, kiun ili ĝis tiam tute neglektis. Nun ili ĉiuj fariĝas tre amikaj kaj bonvolaj al la veterinaro, eĉ, Maslarski, la prezidanto de la lerneja komitato sukcesas edzinigi al li sian filinon. Kaj kiam evidentiĝis, ke la mono alvenis por alia homo kun la sama nomo, jam estis malfrue likvidi tiun misdecidon...

Ĉiuj geaktoroj parolis belan Esperanton, kaj sukcesis imprese aperigi la

verkon ankaŭ sur la malgranda scenejo de la Teatro „Miklós Radnóti", kvankam certe ili kutime prezentas *La milionulon* sur pli granda scenejo. Aparte elstara estis la ludo de Belka *Beleva* (en la rolo de Maslarska) kaj Anani *Anev* (en la rolo de Maslarski). La komedion reĝisoris merita aktorino Gertruda *Lukanova*, tradukis ĝin Kunĉo *Vâlev*.

Ferma programo

La ferma programo de la 3-a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj estis, kiel pli frue, ankaŭ nun parada revua programo. Pro diversaj teknikaj kialoj ĝi ne povis esti tiel riĉa kiel kutime: ĝi daŭris nur unu horon. En ĝi rolis la konata bulgara kantistino Maria *Angelova*, Katalin *Berek*, la pupartistino Gyöngyi *Blasek*, Ildikó *Pécsi*, la bulgara aktoro Mihail *Ĉobanov*, Péter *Kertész*, István *Pathó* kaj Kálmán *Szabó*, kiu ankaŭ reĝisoris la tutan programon.

Resume, oni povas diri, ke la ĉijara teatra aranĝo estis esence sukcesa. Tamen, jam la trian jaron ni sukcesas allogi nur tre malmulte da eksterlandaj spektantoj, kaj eĉ la Budapeŝtaj esperantistoj ne montris tre grandan interesiĝon al la prezentadoj. Restas fakto, ke por la ripetoj jam ne vendiĝis ĉiuj biletoj, kvankam en la spektejo de la Teatro „Miklós Radnóti" troviĝas nur 230 sidlokoj...

Kálmán Szabó kiel simio en „Letero al la Akademio"

Marto sen GABI JOBBA

Marto alproksimiĝas de ie kaj min en vendredaj noktoj vekas la penso pri via morto. Unua marto sen Gabi Jobba en Budapeŝto. Kial min koncernas ĉi-tiu eta frazo en la monda frazriĉo?

Mi restis ŝuldanta al vi. Mi volis venigi „Aŭrorojn" al Dubrovnik. Mi volis prezenti vin en Jugoslavio. Mi ne faris. Neniam plu mi sukcesos. Ĉu pro tio sieĝas min antaŭmarte la memoro pri viaj okuloj?

Laste kiam mi vidis vin, vi ekzercis Petőfi-prezenton. Mi volis ĉeesti la provekzercon. Longe mi atendis en la mallumo de la Radnóti-spektejo. Fine vi aperis tuj post iu alia teatra devo. Jam tro malfrue, por mi jam ie siblis la lasta metroo al Örs vezér tér. Mi nur vidis kiel vi surscenejiĝis. Vi surhavis nigran pantalonon, kaj tiris la fingrojn tra viaj haroj. Mi nun metas rubandon al ili. Enveninte vi diris: „Iam en tiu Hungario – mi ankaŭ estos eble io." Mi haltis kun la mano sur la anso, konvinkita pri la frazforto. Vi haltis, raspigis la voĉon kaj diris hungare al iu ion kio per „infanoj" komenciĝis. Nun, pli poste, mi komprenas ĝin: vi petis, ke la lumigisto alĝustigu la reflektorojn.

Mi foriris serĉi mian metroon. Kaj imagu nun la forton de tiu adiaŭo. „Iam en tiu Hungario, mi ankaŭ estos eble io." Ĉu tiel tekstas la lasta verso de nia renkontiĝo? „Infanoj, la reflektoron", tio estas plie nur mia konjekto. Tra la denso de la nekonata hungara kaj tra mia propra deziro reteni etan reflektoron sur mia memoro pri vi.

Mi volis fariĝi via amikino. Nun, kun la morto inter ni du, mi rajtas diri al vi tiun ĉi frazon. Mi volis proponi al vi, ke vi faru monodramon pri la morto. Pri Verda Majo en Jimausi. Pri „Flustro el uragano". Monodramon por la kongresa teatrafo en Pekino 1986. Se vi vivus, eble mi ne kuraĝus eldiri tiun ideon.

Hieraŭ, ĉe la relego de Cesare Pavese mi subite revidis vin. „Venos la mort' kaj ĝi havos viajn okulojn". Se tiel, eble mi ne timpensu pri ĝi.

Neniam mi kun vi interŝanĝis vorton. Eĉ ne manpremis. Kaj tamen ial ŝajnas konsolinde, ke la morto havu viajn okulojn.

Eta febro antaŭmarta. Nokto sieĝas Zagrebon. Kial mi vekiĝas kun amara tristo de maltrafitaj renkontiĝoj?

Ripozu, Gabi Jobba. Eble tiujn versojn Petőfi ankaŭ por vi verkis.

Spomenka Ŝtimec

Imre Szabó

Senorda raporto

(Omaĝe al Lajos Kökény)

Majĉiela kloŝo fermis
la densan tombejon –
amikoj venis,
kunbatalantoj venis,
kamaradoj venis,
samideanoj venis,
memoroj venis,
florokronoj venis,
funebraj ombroj venis,
verdaj, nigraj, blankaj rubandoj venis,
tremantaj piedoj venis
kaj abrupte ĉio rigidiĝis,
katafalko
lumo lumo
vitrokesto
griza urno
nur pala mano ankoraŭ metas
solan ruĝan dianton;
lastan manpremon,
garditan spasme
dum la tuta veno...

en la ringo festa
paroloj palpadis Viajn historiajn meritojn,
sed por mi ekparolis ĉirkaŭe plie
la feste gladitaj vizaĝoj,
la ektremaj brovoj,
la malĝuste ligitaj kravatoj,
la kunpremitaj lipoj,
la pintaj mentonoj,
la silento en la fruntosulkoj...

Majĉiela kloŝo
super la verda eksplodo,
super la aktuala revolucio de
la herboj, arboj, floroj,
super la elektraj aromoj,
super la freŝaj vastejoj,
super la densa betonurbego,
super la formikoj (aŭ homoj?),
super la torenta suno –
kaj tiu alia griza fermokloŝo, apenaŭ pli granda ol homa mankavo,
sub la verda flago, kiu flankeniĝis iom...

La renkontoj hazardaj
renove ekokazis kaŝitaj en mia kranio:
Vi prelegis en grupo Egressy –
en la ĉambro sunon radiigis,
torentojn ekigis
la vortoj, kvankam milde panmolaj...
aŭ la buso n-ro 8,
kie dum momento ĉesis
ĉiuj bruoj de la metropolo,
kvazaŭ Vi fermus la pordojn
por troviĝi en intima ĉambro kun mi,
eĉ se meze de homamaso –

tiel Vi transformiĝis
en amikajn manpremojn,
en flugilhavajn vortojn,
en etoson –
mi gardas Vin plu
kiel majan sunon,
kiel majan torenton,
porĉiaman verdan eksplodon...

Mi komprenis,
ekde nun estos Vi
nur ni ĉiuj –

ja aperis la du sepultaj servistoj,
prenis Viajn cindrojn,
firmapaŝe ili ekis,
ja atendis la nigra aŭto,
kun motoraj zumoj.

La amaso longe tiriĝis
pli kaj pli mallarĝa
tra la zigzagoj de la intertombaj padoj,
kaj komenciĝis abelujaj interparoladoj:
kion Vi faris tiam kaj tiam,
kio okazos en la klubo,
kiel vojaĝi al Aŭgsburgo,
kiuj estas la lastaj akiritaj esperantaĵoj,
kiuj gastis kaj kie,
do entute kiel fartas la movado.
Nun la unuan fojon
tamen Vi devis iri ĉepinte,
kvankam tion Vi dumvive malŝatis –
mi atingis Vin,
sed la vitrokesto malplenis jam,
– Vi fuĝis, kaŝe forkuris, Vi eskapis –
ŝajnis momente.

La adiaŭajn Esperanto-vortojn,
la pacon de arboj, herboj, floroj
rompis aviadilo
travundanta la ĉielon,
Vi mildis griza,
kaj la ŝuto de tero,
Vi mildis griza,
lastaj diantoj ankoraŭ,
Vi mildis griza,
kaj la betonplato kuŝis jam super Vi –

Tiumomente Vi fariĝis tero,
mi ekhontis tuŝi Vin per piedoj,
mi alrigardis miajn ŝuojn,
kaj tie,
tute apude,
kuŝis urno
malplena,
griza same
kiel la Via.
Mi ekfuĝis,
tamen rerigardante kun obstino:
ne,
tamen ne,
ne eble,
neniam...

Nur la vidvino sola senmovis antaŭ Vi,
nur la vidvino sola senmovis antaŭ Vi,
iuj manoj ordigis la rubandojn
kun la surskribo:
ADIAŬ AMIKO.

Malproksime,
en la urba bruo jam,
en la pluondanta amaso jam
ekfulmis en mi:
mortis la lasta el tiu epoko,
el tiu heroa epoko,
mortis Lajos Kökény,
mortis Ludoviko Kökény...

Sekvatage mi rakontis pri Vi
al mia filino kvinjara –
ŝi enkapigis Vian nomon.

Vilmos Benczik

Ducent horoj trans la Granda Muro

Antaŭ 35 jaroj en la fora Ĉinio aperis laŭaspekte modesta revuo, kiu metis antaŭ si la celon raporti al la mondo pere de Esperanto pri la freŝe fondiĝinta Ĉina Popola Respubliko. Ĝia titolo estis: *El Popola Ĉinio.* Tiu ĉi revuo dum la lastaj tri kaj duono da jardekoj fariĝis la plej ampleksa kaj teknike la plej bela revuo aperanta en Esperanto, kaj post la forpaso de la tempeste kaosaj jaroj de la „kultura revolucio" EPĈ ankaŭ enhave estas fierajo de la Esperanta gazetaro.

La Redakcio de EPĈ okaze de la jubileo aranĝis festan kunvenon en Pekino, al kiu estis invititaj reprezentantoj de diversaj Esperanto-organizajoj kaj redaktoroj de Esperantaj revuoj. Inter la 20-a kaj 28-a de majo partoprenis la celebradon de la jubileo gastoj el Britio, Francio, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Pollando kaj Usono. La ĉinaj esperantistoj – kunlaborantoj de ĈEL, la Redakcio de EPĈ, Radio Pekino kaj Internacia Librokomerca Kompanio de Ĉinio prezentis al la gastoj ankaŭ la vidindajojn de Pekino, kaj poste sekvis vojaĝo al tri aliaj ĉinaj urboj: Ŝanhajo, Hangĝoŭ kaj Suĝoŭ.

La 20-an de majo posttagmeze nia trajno post tridekhora veturado el Ulanbatoro alvenis en la stacidomo de Pekino. Akceptis nin – polojn kaj hungarojn – samideanoj *Ŝju Ŝanŝu, Ĵang Ĵumo* kaj *Li Ŝiĝjun,* la estraro de la Redakcio de EPĈ. (La Redakcio havas ĉ. 50 kunlaborantojn.)

En la sama vespero ni havis la okazon fari viziton al la sidejo de Internacia Librokomerca Entrepreno de Ĉinio, kie akceptis nin la ĝenerala direktoro. Li konigis la agadon de tiu eksporta firmao, kiu distribuas en la mondo EPĈ kaj ĉiujn ĉinajn Esperantajn librojn. La Esperanta sekcio de la firmao havas momente du kunlaborantojn.

La sekvan matenon okazis kunveno ĉe la Redakcio de EPĈ. S-ano *Li Ŝiĝjun* raportis pri la historio kaj nuntempa agado de la Redakcio, poste sekvis diskuto pri la manieroj plibonigi la revuon. La redakcianoj tre atente notis ĉiujn rimarkojn de la gastoj.

Posttagmeze okazis jubilea festa kunveno, kiun ĉeestis ankaŭ pluraj altrangaj ŝtataj gvidantoj: *Jaŭ Jilin,* alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; *Hujucz,* vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo; *Hŭang Hŭa,* vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola

Vilmos Benczik transdonas la saluton de Hungara Vivo al la jubileanta El Popola Ĉinio

Parolado de Lju Ĝiŝjan, vicministro de kulturo

Estimataj gastoj, geamikoj kaj gekamaradoj:
Hodiaŭ ni ĝoje kolektiĝis ĉi tie por celebri la 35-an datrevenon de la fondiĝo de la gazeto „El Popola Ĉinio". Permesu al mi, en la nomo de la Kultura Ministerio, esprimi koran gratulon al la kamaradoj de la redakcio de EPĈ kaj varman bonvenigon al ĉiuj fremdlandaj gastoj kaj gekamaradoj, kiuj venis por partopreni en la celebrado.

„El Popola Ĉinio", iniciatita de Hujucz, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso, estas unu el la plej fruaj revuoj por eksterlandaj legantoj kaj ankaŭ la plej longe eldonata kaj plej grandinflua Esperanta revuo en la historio de la ĉina Esperanto-movado. La fakto mem montras, ke niaj Partio kaj registaro alte taksas la rolon de Esperanto en akcelo de la kultura interfluo, interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Antaŭ sia forpaso niaj estimataj kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Ĉen Ji plurfoje donis personan atenton al la Esperanta laboro. En la dek tumultaj jaroj kamarado Ĝoŭ Enlaj en malsano ankoraŭ instrukciis, ke la koncerna fako de la Ŝtata Konsilantaro zorgu pri la Esperanta laboro. Kamarado Ĉen Ji persone ĉeestis Esperantan laborkunvenon kaj faris multajn gravajn proponojn pri la Esperanta eldonado. Subtenate de li EPĈ komencis eldoniĝi ĉiumonate anstataŭ en ĉiu dua monato. Tial ni diras, ke „El Popola Ĉinio" kreskis ĝuste sub la prizorgo de kamaradoj Ĝou Enlaj kaj Ĉen Ji.

En la pasintaj 35 jaroj la redakcio de EPĈ eldonis ankaŭ nombron da Esperantaj libroj. La gekamaradoj laborantaj en ĝi faris multajn laborojn por prezenti al la mondo la atingojn de la nova Ĉinio en la ekonomio kaj kulturo, la novan vivon kaj novajn morojn de la ĉina popolo, fundamentajn sciojn pri Ĉinio, kaj por akceli la interkompreniĝon kaj amikajn kontaktojn inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Nun „El Popola Ĉinio" servas siajn legantojn en pli ol 108 landoj kaj regionoj kaj estas konata kiel unu el la „plej belaj Esperantaj revuoj". Tiuj sukcesoj venis ja ne facile. Ili estas rezulto de la ĝusta gvidado de la Partio, rezulto de la diligenta laborado de ĉiuj laborantoj de la redakcio de EPĈ kaj ankaŭ rezulto de la granda subteno kaj plena kunlaboro de ĉinaj esperantistoj kaj frataj unuoj.

Ankaŭ granda nombro da legantoj kaj perantoj de EPĈ, la Universala Esperanto-Asocio kaj diverslandaj Esperantaj organizoj multe kontribuis al ĝia eldonado kaj distribuado, pro tio ni ĉiam havas profundan respekton al ili. Profitante la nunan okazon ni esprimas koran dankon al niaj honoraj gastoj el diversaj landoj kaj petas ilin transdoni niajn bondezirojn kaj dankon al aliaj legantoj kaj perantoj de EPĈ en iliaj landoj.

La 35-jara historio de „El Popola Ĉinio" pruvis, ke Esperanto estas esperplena lingvo, per kiu oni povas multe fari por akceli la sciencan kaj kulturan interfluon, interkompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj kaj defendi la mondpacon. Via laboro estas signifoplena kaj valora. Mi kore deziras, ke la kamaradoj de la redakcio de EPĈ pli intime kontaktiĝu kaj kunlaboru kun la diverslandaj legantoj kaj amikoj kaj faru pli grandan kontribuon al la progreso de la homaro kaj al la mondpaco!

Nun tre bona estas la situacio de nia lando en politiko kaj ekonomio. Sub la gvidado de la principo malfermi nian pordon al fremdaj landoj kaj vigligi la ekonomion enlande, ni faras plenampleksan reformadon al diversaj entreprenoj, kun la reformado de la urba ekonomia sistemo kiel la ĉefa, kaj klopodas por krei novan perspektivon. Nun diverslandaj popoloj tre deziras informiĝi pri la nova disvolviĝo kaj novaj ŝanĝoj de Ĉinio kaj ni devas kontentigi ilin en tio. Mi sincere esperas, ke la kamaradoj de EPĈ diligente laboros, sin detenos de fiero kaj malpacienco, senĉese perfektigos sin ideologie kaj laborkapable, plibonigos la revuon, ke ĝi pli bone konformu al la gustoj de la legantoj, kaj malfermos novan perspektivon por la Esperanta eldonado. Ankoraŭ pli grandan sukceson al „El Popola Ĉinio"!

Dankon!

Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato por la 71a Universala Kongreso de Esperanto; *Ĉu Tu-nan,* membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, estro de la Ĉina Asocio por Amikeco kun Eksteraj Landoj kaj prezidanto de la societo „Amikoj de Esperanto"; *Ĝoŭ Ŭejĝi,* aganta ministro de kulturo; *Lju Ĝiŝjan,* vicministro de kulturo kaj multaj aliaj elstaraj reprezentantoj de la ĉina politika, socia kaj kultura vivo.

Estas menciinde, ke vicĉefministro *Jaŭ Jilin* iam mem partoprenis la Esperanto-Movadon, kaj ĝis nun li kapablas legi en Esperanto. Bele pruvas la altan socian prestiĝon de Esperanto en Ĉinio ankaŭ la fakto, ke la prezidanto de la Honora Komitato de la 71a UK fariĝis *Hŭang Hŭa,* unu el la internacie plej konataj ĉinaj politikistoj.

S-ano *Ŝju Ŝanŝu* prezentis al la kunveno la longan vojon, kiun EPĈ trapasis dum la forpasintaj 35 jaroj. Poste sekvis la salutoj de la eksterlandaj gastoj, kaj la parolado de *Lju Ĝiŝjan,* vicministro de kulturo.

Vespere de la sama tago Ĉina Esperanto-Ligo kaj la LKK de la 71a UK akceptis nin. Ĉe tiu akcepto s-ano *Ĵang Ĝiĝeng,* vicprezidanto de LKK donis informojn pri la antaŭpreparoj de la 71a UK.

La 22-an de majo matene sekvis ekskurso al la Granda Muro, situanta je ĉ. 70 kilometroj norde de Pekino. La impona konstruaĵo estas tre impresa: ĝi estas kvazaŭ simbola manifestiĝo de la plurmiljara ĉina historio. Post la Granda Muro sekvis vizito al la Maŭzoleo de la Ming-dinastio (1368-1644). La subteran palacon oni plene malkovris nur post la jaro 1956. Kaj ĉe la Granda Muro, kaj ĉe la Ming-Maŭzoleo estis multegaj turistoj: ankaŭ tre multaj eksterlandanoj, tamen plejparte ĉinoj.

Post la ekskurso, vespere, la Redakcio de EPĈ aranĝis bankedon, kie ĉeestis ĉiuj ĝiaj kunlaborantoj, kaj ankaŭ pluraj gvidantoj de la ĉina politika, socia kaj kultura vivo, interalie Hŭang Hŭa, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso. En tiu ĉi kunveno – kiel ankaŭ en la aliaj – ĉiam estis okazo por neformalaj amikaj interparoloj ne nur kun la gvidantoj de la ĉina Esperanto-Movado, sed ankaŭ kun pluraj politikaj gvidantoj, kiuj montris viglan interesiĝon pri Hungario.

La ĉinaj oficialaj rondoj donis gravan atenton al la jubileo. Maldekstra foto: Hŭang Hŭa, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso akceptas la ĉefredaktoron de HV (tute maldekstre staras Ŝju Ŝanŝu, vicestro de la redakcio de EPĈ). Dekstra foto: Konversacio kun Lju Ĝiŝjan, vicministro de kulturo

Ne eblas preterlasi ankaŭ iun alian aspekton de tiuj kunvenoj, nome la *gastronomian*. Pli ol dudek palatotiklaj pladoj en ĉiu kunveno – kiuj laŭ Eŭropaj konceptoj povus nomiĝi bankedoj – pravigas la onidiron, laŭ kiu la Disinjoro certe havas ĉinan kuiriston...

La 23-an de majo matene sekvis vizito al la iama Imperiestra Palaco, alinome „Malpermesita Urbo". Tiu ĉi „urbeto" ampleksas 720 mil kvadratajn metrojn, ĝi estas ĉirkaŭata per muro 10 metrojn alta kaj per fosaĵo 52 metrojn larĝa. En tiu ĉi unika ensemblo de la ĉina arkitekturo troviĝas proksimume naŭ mil ĉambroj. En la Malpermesita Urbo loĝis la imperiestroj de la Ming- kaj Qing (ĉin)-dinastioj.

Posttagmeze portempe ni adiaŭis Pekinon, kaj flugis al Hangĝoŭ, urbo laŭ ĉinaj konceptoj malpli granda (kun 3,5 milionoj da loĝantoj), kiu inter 1127-1279 estis la ĉefurbo de la suda Song-dinastio. Tie nin atendis mondo klare diferenca disde la Pekina.

(Daŭrigota)

Konversacio dum la bankedo: Vic-ĉefministro Jaŭ Jilin informiĝas pri la atingoj de la hungara Esperanto-movado

Ervin Fenyvesi

Betjaroj surĉevale

Sobri Jóska.

Multaj historietoj krozis tra la mondo, strangaj kaj kuriozaj por la vasta publiko, pri la romantike aŭdacaj kaj fulmrapide rajdantaj banditoj de la iamaj hungaraj regionoj. La turkdevena nomo de tiu „profesio": *betyár* (pron. betjar) iĝis famekonata, samkiel la slavaj vortoj: *hajduk, hajdut, hajdamak,* aŭ la itala *brigante.* Iliaj deveno kaj socia fono multe paralelis, malgraŭ la diversaj landoj. Ankaŭ la loka folkloro simile rakontis ilian sorton en ploreplendaj kantoj. La popola ribelemo ankaŭ tiamaniere reflektis la feŭdecan subpremon, kiu kondukis rekte al banditismo, al kruda, senbrida krimado.

La romantikismo volonte konsideris ilin kuraĝegaj bravuloj, kiuj trobadore ĝentilas al virinoj, kondutas grandanime al mizeruloj. Estiĝis kutimo „trovi" la devenon de la plej famiĝintaj banditoj en iu aristokrata familio, kies noblanima filo, oponanta la malicajn parencojn, ekiris vagabondi. Rekta vojo: fine li iĝis – sub kaŝnomo – brava, kavalir-anima bandito, kiu facile superruzis la riĉajn, malsimpatiajn viktimojn kaj la aĉajn servantojn de la potenco. Tiel sonas la folkloraj legendoj ĉiulande, kiuj kvazaŭ antaŭas la nuntempajn bildromanojn pri nevenkeblaj „superhomoj".

Jen unu tipa, sprite-luda aventuro el la legendaro pri betjaroj.

En urbo E. la riĉega episkopo ricevis leteron: *„Bonvolu 10 000 florenojn doni al mi. Kun danko mi mem transprenos ĝin. Sobri."* Jam la nomo de la tutlande fama betjaro *Sobri Jóska* (pron. Ŝobri Jooŝka) sufiĉis por teruri la episkopon, ja lia armita bando jam multajn prirabis. Tuj armita servistaro ekgardis la kastelon, lia moŝto eĉ promeni ne kuraĝis en la propra ĝardeno. Iutage eleganta kaleŝo kuris al la episkopa pordego, kaj lakeo en ore galonita livreo helpis elpaŝi nobel-aspektan husaroficiron. Tiu ĉi prezentis sin kiel nova bienulo en la regiono, kiu volas montri sian humilan respekton al lia moŝto. La honorinda gasto estis afable akceptita, ankaŭ per riĉa regalo, post kiu la episkopo kondukis lin en sian kabineton por iom interparoli pri la alta politiko.

Dum la diskuto la oficiro subite saltis al la pordo, ŝlosis ĝin kaj direktis pistolon al la ĉefpastro:

Pistolo uzata de la bando de Sobri



– Nenia krio! Mi estas Sobri, mi venis por la mono!

La pistolo dancis antaŭ la okuloj de la konsternita episkopo.

– Miaj kunuloj ĉirkaŭis la kastelon kaj ekbruligos ĝin, se mi ne foriros sen-ĝene. Donu do rapide la monon, kaj faru, kvazaŭ estus okazinta nenio! Via moŝto bonvolos akompani min ĝis mia kaleŝo, kiu atendas ĉe la pordego.

La teruriĝinta pastro time-treme prenis la monon el sia sekreta kesteto. Sobri trankvile denombris kaj enpoŝigis ĝin. Du afable rigardantaj sinjoroj iris kune al la kaleŝo inter kliniĝantaj pastroj kaj servistoj. Anstataŭ adiaŭi, la husaro ekvoĉis:

– Mi havos grandan plezuron, se via moŝto akompanos min iom...

Senvorte la episkopo eksidis en la kaleŝo, la koĉero klakis per la vipo, kaj la ĉevaloj jam kuregis al la foro. Post longa horo, lace kaj mortpale revenis la prirabita episkopo, kiun Sobri ie forlasis ĉe la landvojo...

La realo

Filo de vilaĝa forĝisto, Sobri naskiĝis komence de la 19a jarcento. La vilaĝaj junulinoj volonte rigardis la ĉarman

Dancantaj betjaroj

fraŭlon, kiu ŝatis amuzi kaj diboĉi en la drinkejoj. Monon li akiris baldaŭ per ŝteloj, sekve Sobri ekkonis la karceron. kie ne mankis bastonpunoj, instigantaj lin fuĝi for de tiu kruela loko. Sekvis kaŝita vivo, noktaj rabadoj por vivteni sin, foje granda predo ĉe mortbatita riĉa ŝafisto. Malica afero: oni kaptis lian kunkrimulon – tiu finis sur pendumilo –, sed Sobri evitis tiun sorton: de nun li devis vivi la rolon de senhejma bandito, kaŝanta sin prefere en arbareg' obskura. Tie renkontiĝis similaj ekzilitoj, kreiĝis bando, kiu multe rabadis dise en Transdanubio. La ĝendarmoj estis senpovaj kontraŭ ili: bonaj ĉevaloj kaj ruza lerteco igis la bandon sukcesa, krome la kontaktoj kun la kamparanoj, kiuj ĝenerale inklinis helpi la jam popularan bandon de Sobri.

Okazis, ke li atakis kun 30 kunuloj intendanton de grandbieno, rabante egan monsumon, juvelojn kaj armilojn. Monaton poste Sobri sieĝis kastelon de altranga bienulo: la servistoj estis ŝnurligitaj kaj ĵetitaj en kelon. La kaptita sinjoro kun la edzino senpove devis rigardi la rabadon.

Kiam la bando iĝis jam tro multnombra, ili disduiĝis, „frate" dividante inter si la predotajn regionojn. Pro la vasta agado de la betjaroj oni kolektis kontraŭ ili trupojn da soldatoj kaj ĝendarmoj, arojn da kamparanoj. Tiu armeo persekutis la „malriĉajn knabojn" tra departementoj kaj densaj arbaroj de la montaro Bakony apud Balatono. La betjaroj, unu post la alia, venis en manojn de la ĝendarmoj kaj post rapida juĝado sub la pendumilon.

Komence de 1837 ducento da soldatoj, ĝendarmoj, nobeloj kaj servistoj atakis la restintajn dudek betjarojn. La

Betjaroj amuziĝas

Rózsa Sándor – la reĝo de la betjaroj

interpafado daŭris tutan horon. Apud la falintaj kunuloj, finfine, Sobri mortpafis sin por ne kaptiĝi viva. Kelkaj betjaroj eskapis, tamen la landon teruranta bando definitive neniiĝis.

Sed ne en la legendoj kaj kantoj! Laŭ tiuj la surloke enterigita ornamvestita betjaro ne estis identa kun Sobri... ĉar li vivas plu, sukcese eskapis, kaj nun sekrete li loĝas ie kiel simpla ŝafisto, onidire en najbara lando, laŭ tiama Munkena gazeto eĉ kiel – apotekisto en Novjorko! Ne tro surpriza supozo, se oni scias, ke troviĝis foje aristokratoj, kiuj provis havigi al si la „gloron" de famaj betjaroj, kompreneble nur en intima rondo trompante la kredemulojn.

Oni produktas banditojn

La „kariero" de Sobri montras, ke la senindulga traktado kvazaŭ perforte pelis malfeliĉulojn elinter la vilaĝa vivo. La brutaleco de la potenculoj celis distreti ĉian agon kontraŭ la „ordo", sed fakte puŝis multajn al vivo eksterleĝa. Etaj krimoj sufiĉis por arestado kaj konfesigo per teruraj torturadoj. La pekinto kun amara venĝemo liberiĝis finfine elinter la ungoj de la aŭtoritatoj, sed post venĝa atenco ŝajnis al li preferinde malaperi ie en ombro. Kaptite ili devis kalkuli pri la plej turmentaj punoj: vegeti en vermoplenaj, malsekaj keloj, porti pezajn ĉenojn, sen eblo pruvi ion ajn kontraŭ la akuzoj.

Ankaŭ la perforte trudita soldatservo (15-20 jarojn longa!) igis dizerti ĝuste la kuraĝulojn. Prefere vivi mizere, sed „libere" ekster la leĝe protektata socio. Arbare-kampare vaganta surĉevale – samkiel Teksasaj *kaŭbojoj* – ili baldaŭ trovis samsortanojn, kies kompanion la komuna danĝero forĝis kaj hardis. Por ili restis nenio alia ol uzi perforton kontraŭ tiuj, kiuj posedas rapide utiligeblajn aĵojn, do rabi monon kaj armilojn, ĉevalojn kaj bovojn – aĉetantoj-komplicoj abunde troveblis. Por ne retrovi iliajn spurojn, ofte ili krudsovaĝe silentigis poreterne la atestantojn, precipe la soldulojn de la potenculoj.

Alianco kun la mizeruloj

La prirabado de bienuloj, komercistoj kaj potenculoj neniel ĝenis la malriĉajn kampulojn, kies konsento ĉirkaŭis la „malriĉajn knabojn", estiĝis eĉ certa kunekzisto inter ili. La betjaroj devenis el la kampularo, kiu kun plezuro observis la timon kaj la damaĝon de la riĉuloj, de la subpremantoj. Ĉar nenombreblaj estis la manieroj per kiuj oni suferigis kaj ĉikanis la servutulojn: oni forprenis paŝtejojn kaj agrojn, altrudis nepagitajn labordevojn ankaŭ al la familianoj. Tiaspecaj suferigoj daŭris eĉ post 1848, forigo de la servuteco, ĉar kapitalmanko, kreskantaj ŝuldoj

Populara libro el la jaro 1817 kun la kantoj de fama betjaro

A Z
ALLFÖLDRE MENENDÖ
ANGYAL BANDI
NÓTÁJI,
és
Utoljára tétettek egynehány legújjabb
VILÁGI
DALLOK.

Nyomtattatott 1817-dik Eſztendöben.

premegis la grandbienulojn por arbitre elsuĉi la kamparanojn.

La popolo venĝis sin – en kantoj. Baladoj, versaĵoj kaj muzikaĵoj omaĝis la plej aŭdacajn betjarojn kaj mokis la humiligitajn sinjorojn, la trompitajn instancojn kaj ĝendarmojn. La historia rezistado kontraŭ la turkaj kaj Habsburgaj invadintoj dum la jarcentoj, donis al la rifuĝintoj naciajn kaj ribelajn trajtojn – kiel ajn brutalaj krimuloj ili fariĝis.

Menciindas, ke la betjaroj krimis per metodoj kaj manieroj, kiuj estis familiaraj ĉe la kampuloj kaj paŝtistoj. Ankaŭ ili galopis sur rapidaj ĉevaloj, ĵetis rajdante lazon por kapti beston (aŭ malamikon), uzis lertege la longrimenan vipon kiel armilon por alterigi rajdanton, returni ĉevalojn kaj bovojn.

La reĝo de la stepoj

La plej fama betjaro – akirinta eĉ politikan signifon – estis *Rózsa Sándor* (Rooĵa Ŝandor – 1813-78). Preter la rivero *Tisza* etendiĝis senfinaj stepoj, uzataj de multaj paŝtistoj, kiuj vivis preskaŭ kiel nomadoj. Dissemitaj farmo-domoj, diversloke marĉoj kaj lagetoj kreis kvazaŭ labirinton sur la Granda Ebenaĵo, tre konvenan situacion por senspure malaperi de antaŭ la persekutantaj instancoj.

La patron de Rózsa mortbatis rabistoj; lin, junan pastisteton, oni kondamnis pro ŝtelo de du bovinoj al jarlonga malliberiĝo kaj 25 bastonoj kvaronjare. Post duonjaro li jam ne eltenis kaj forpafis sin el la malliberejo. Fuĝante li murdis tri ĝendarmojn, kaj dum rekorde multaj jaroj li sukcesis diable ruze eviti la arestadon, sekve ankaŭ la pendumilon.

En tiu regiono de urbo *Szeged*, ĉerande de la paŝtista „popolo" abundis junaj bovistoj, pro pekoj – de ili ne klare komprenitaj – vegetantaj kaŝeŝtele, sen eblo trankvile ekzisti. Pelite ili fariĝis aŭdacaj kaj lertaj banditoj, vojaĝantajn komercistojn kaj nobelojn rabantaj, farm-domojn (*tanya*, pron. tanja) okupantaj, en rajdantaj trupoj ĝendarmojn postlasantaj, fieraj kaj minacaj fenomenoj de la stepoj. La betjartrupo de Rózsa Sándor akiris egan famon kaj politikan simpation pro la Habsburga premo, pro la multaj maljustaĵoj de la regado. (La tiama verkisto kaj politikisto *József Eötvös* en la romano *„La vilaĝa notario"* esprimis arte tiujn cirkonstancojn kaj la simpation al betjaro. Vidu HUNGARA ANTOLOGIO, 1983. p. 72.)

Kronis la simpation, kiam Rózsa Sándor dum la revolucia milito (1848) petis amnestion de la hungara registaro kaj promesis konduki grandan trupon de la „malriĉaj knaboj" kontraŭ la Habsburga armeo. Kaj vere, post la amnestio lia ducent-membra trupo per siaj specifaj armiloj brave batalis kiel geriloj, laŭdataj de generaloj. Poste Rózsa ekloĝis en Szeged, sed post la malvenko li denove estis persekutata. Tute vane oni ĉasis lin eĉ per soldataro, Rózsa Sándor, samkiel multaj persekutitaj politikistoj de la hungara sendependeco, kvazaŭ englutita de la tero, nenie troveblis malgraŭ tre altaj kappremioj. La popolo kontribuis multmaniere al lia kaŝa betjar-vivo, li jam simbolis la kontraŭ-Habrburgan reziston, la nacian volon. Pro la truditapeniga soldatigo kaj pro la tiranaj malliberigoj tiutempe plimultiĝis vagabondoj, kolektiĝis denove betjaroj elinter la soldatoj de la revolucio.

Post 8 jaroj da plensukcesa vagabondado, fine liaj kunuloj kaptis lin pro kverelo: la tutlandan simpation ĝuantan betjaron kondamnis ĉefurba tribunalo. Dum grandega bruo, fine imperiestro Francisko Jozefo la mortpunon anstataŭigis per ĝismorta malliberejo. Post 7 jaroj li ricevis amnestion – ja, Hungario tiam interpaciĝis jam kun Aŭstrio...

Ekstermo de la betjaroj

La plivastiĝinta banditismo en la Grande Ebenaĵo iĝis ne eltenebla pro la novaj, trankvilon bezonantaj cirkonstancoj. La restinta kontraŭstaro de la popolo iĝis „ne-dezirata fenomeno", oni volis ĉesigi ĝin. Ankaŭ la kapitalizado de la provincoj postulis sekurecon kaj ordon. Jam ne Habsburgaj ĝendarmoj, sed la hungara registaro prenis la aferon en sian manon: definitive *likvidi* ĉian betjar-agadon, kaj la banditismon,kaj la popolan rezistadon.

La kaptitajn betjarojn oni traktis senindulge

En Szeged grafo *Ráday* inaŭguris egan turmentejon en ampleksa kazerno, kien li enprizonigis multajn centojn da suspektindaj kampuloj. La plej teruraj kaj ruzaj, korpaj-animaj torturadoj konfesigis la mizerulojn, ĉu pekajn, ĉu senpekajn, mencii kulpojn kaj kulpintojn, komplicojn, atesti kontraŭ aliaj kaj inverse. Maskoj kovris la vizaĝojn de la kaptitoj, ne sciantaj pri siaj kunkulpuloj, nek pri la pruvoj. Loka tribunalo rapidmane pendumigis unu post la alia multajn betjarojn, alkroĉiĝintajn ricelantojn, predokaŝantojn, almenaŭ tiujn, kiuj restis vivaj post la hontinda turmentado. La fama reĝisoro, *Miklós Jancsó*, klopodis respeguli tiun konsternigan likvidadon de la betjar-mondo en la filmo „Malriĉaj knaboj", ankaŭ kiel pratipon de la faŝismaj koncentrejoj de nia jarcento. Post kelkaj jaroj tiu turmentejo ĉesis funkcii.

Grafo Ráday invitis al si la verŝajne honeste vivantan Rózsa Sándor, „por komisii" lin pri gravaj ŝtataj taskoj. Inter bajonetoj li estis kaptita tie. La sadismaj metodoj alportis la rezulton: Rózsa konfesis pri rabadoj de trajnoj, prenadoj de kasteloj kaj multajn aliajn krimojn. Pri politikaj aferoj oni nenion demandis, nek akuzis lin, tio estis forgesinda... Malproksime de la stepoj, inter montoj situis granda izolita malliberejo, kie Rózsa Sándor devis poste ekzisti, ŝtrumpojn trikante dum siaj lastaj jaroj.

La romantika periodo jam pasis, la mondo de la betjaroj ne havis plu lokon en la nova, kapitalisma mondo. La krimado turniĝis al pli modernaj direktoj, precipe al la urboj. La stepoj kaj arbaroj ĉesis esti kaŝejoj por eksterleĝe vivantoj, malrapide ŝanĝiĝis ankaŭ la cirkonstancoj, kiuj elpelis ilin el la socio.

György Moldova
(1934–)

La semaforo

Tiun vesperon rakontis Jenei, la maljuna meblisto, kiu kontraste al la labortago venis en festa, malhela vestaĵo malsupren al la placo. Polvaj kardoj kroĉiĝis al lia pantalon-refaldaĵo, vidiĝis, ke li estis ie fore ĉe la urborando:

– Tiel fine de aŭgusto mi aĉetas laŭkutime bukedon da floroj, kaj portas ĝin al relvojgardista dometo situanta trans la manovra stacio Rákos. Tie mortis Katika, nepino mia en aŭgusto de 1951, kiam okazis tiu granda fervoja katastrofo. Ekde tiam pasis pli ol dek jaroj, sed eĉ ne unusola tago pasis sen mia repenso pri Katika. Mi imagas: ŝi nun farus la maturiĝan ekzamenon, nun ŝi edziniĝus. Tamen tiu bukedo da floroj estas dediĉita ne al ŝi.

La knabineto somerumis ĉe la gepatroj de mia bofilo. La bofilo ne ricevis libertempon kaj li petis min vojaĝi por ŝi. Katika retiriĝis en la angulon, la varmego dormigis ŝin. Ni proksimiĝis al Pest, mi pensis: oni devus veki ŝin, kiam la trajno, en kies tria vagono ni estis sidantaj, kuregpuŝiĝis al vartrajno portanta ŝtonojn. Por momento mi restis senmova, ĉar mi ne sciis pri mi mem: ĉu mi estas vivanta, ĉu mortinta, nur poste mi eksentis – la frunton ŝiris al mi la kontraŭa hoko por vestaĵoj, kaj sango kovras al mi la okulojn. Mi rigardis al la nepino, ŝi povra kuŝis tie kiel iu ĉifonpupo, ŝiaj manoj-piedoj pendadis, eble eĉ unusola osto ne restis senrompa en ŝi. Mi kaptis ŝin kaj rampis tra la vagonflanko eksteren, sed la kuracisto povis nur tion diri, kion ankaŭ mi sciis: Katika mortis.

Kia ja estas la homo, ho Dio potenca! Kvazaŭ eĉ ereton da doloro mi ne sentis pro la sorto de la nepino, ĝi alvenis nur pli malfrue, dum la labortagoj vespere je la kvina kaj duono, je kiu tempo iam antaŭlonge mi laŭkutime ekiris por ŝi al la infanĝardeno, kaj la ĉapon mi jam metis sur la kapon, por ke mi iru por ŝi, kiam venis al la kapo: ne ekzistas por kiu iri. La frenezigaj imagoj same pli malfrue leviĝis: se mi vekos ŝin pli frue, eble ŝi restintus viva. Tiam mi ne povis pensi pri alio, nur ke miaj filino kaj bofilo neniam pardonos al mi pro la morto de la infano. Mi tenis la knabineton surbrake kaj enviciĝis inter la kuregantajn homojn kaj ankaŭ mi kriegis. Mi jam apenaŭ memoras, kiuj kuris apud mi. Ŝajnas, ke la sango fluis sur la blankajn gimnastikajn ŝuojn de iu viro. Ni ĉiuj serĉis la kulpulon kaŭzantan la katastrofon, por venĝi lin.

La fervojistoj diskuris aŭ viciĝis inter nin, kaj klarigadis, ke la lokomotivo kuregis kontraŭ la varvagonojn portantajn ŝtonojn tial, ĉar la semaforo antaŭe signis verde. Ĉiuj niaj koleregoj direktiĝis kontraŭ la trajnekspedisto. Ni ne trovis lin supre en la vitraĵmura direktejo, ni traserĉis ĉiujn konstruaĵojn de la ĉirkaŭaĵo, fine ni trovis ŝin malantaŭ la bretoj de la lampodeponejo.

Kvazaŭ mi eĉ nun vidus ŝin: ĉirkaŭ kvardekjara virino ŝi estis kun okulvitroj, malelegante aspektis sur ŝi la fervojista uniformo. Ni tiregis ŝin de malantaŭ la lampoj inter la relojn, la homoj kriegante skuadis la pugnojn antaŭ ŝi, kaj montris la mortintojn. La virino ploris, disetendis senpove la manojn kaj ĵuris, laŭformule ŝi agis: la semaforon ŝaltis je ruĝa. Tion neniu kredis al ŝi, eĉ la fervojistoj ne, fine la konfeso de la hejtisto estis decida, oni alportis lin ensine antaŭ la lampokameron, sed li ĵuris, ke la semaforo montris verdan.

Troviĝis en la amaso du-tri homoj dirantaj: oni devus transdoni la virinon al la tribunalo, sed la plimulto fortrenis tiujn. Tie la homoj pendigis ŝin sur la muron de la relvojgardista dometo. Mi travivis du militojn, sed neniam vidis pli kompatindan kondamniton ol tiu virino, eĉ per unusola fingro ŝi ne defendis sin, ĝisfine ŝi diradis, ke ŝi estas senkulpa, ŝi ŝaltis la semaforon je ruĝa. Kiam alvenis la policistoj, la trajnekspedistino jam estis mortinta.

La policanoj surpaperigis niajn nomojn – eĉ nek unusola troviĝis inter ni, kiu provus forigi la respondecon de si, tiel forte ni estis konvinkiĝintaj pri nia pravo. Kvankam mi per la manoj propraj ne tuŝis la virinon, mi diris antaŭ la tribunalo, ke la saman punon meritas ankaŭ mi, kiun la pendigintoj, ĉar ili agis ankaŭ en mia nomo. Mi estis punita per suspendita enkarcerigo, ankaŭ la aliaj ne estis tro severe punitaj.

Pasis la jaroj, mi fariĝis solulo. Okazis tiel, kiel mi ja pensis: la bofilo neniam pardonis al mi pro la morto de Katika, li ne plu vizitis min kaj ankaŭ mian filinon ne lasis veni al mi. Mi ne ŝatis iri hejmen en la malplenan loĝejon, tiam mi alkutimiĝis staradi la vesperon kun unu-du glasoj da sodakva vino en la angulo de la drinkejo, aŭskultante la paroladon de la homoj.

Venis iun aŭtunan vesperon fervojistoj en la drinkejon, mi atentis pri ili. Ekfrapis al mi la orelojn, ke ili parolas pri tiu relvojgardista dometo, apud kiu la akcidentego okazis en 1951, mi tiriĝis pli proksimen. La fervojistoj traktis inter si, ke nun post jaroj evidentiĝis pri la elektra direktado de semaforoj de la relvojgardista dometo: ĝi ne funkcias tute en ordo. Ĝenerale ĝi funkciis bone – tial povis resti la malkorektaĵo tiel longe nerimarkita – sed foje, eble du-tri kazojn dumjare, pro pluvo aŭ vento ekestis kontaktiĝo, kaj la semaforo ŝaltis de si mem. Estis menciata ankaŭ la katastrofo en 1951, kaj ili asertis: la trajnekspedistino kun okulvitroj tiam ĝuste donis la signon.

Malgraŭ ke mi ne konis ilin, mi enmiksiĝis en ilian interparoladon. Mi rakontis, ke dum la akcidento ankaŭ mi mem estis sidanta tie en la vagonaro, mia konvinko estas, ĝin kaŭzis la malzorgemo de la virino kaj ekriproĉis la mortan trajnekspedistinon. Ili lasis min paroli, nur kiam mia parolo sufokiĝis, tiam diris iu maljunulo, ke li laboras jam delonge ĉe fervojoj, kaj ankoraŭ apenaŭ vidis pli zor-

geman homon, ol estis tiu trajnekspedistino kun okulvitroj. Ŝi ne havis infanojn, vivis nur por la fervojservo, okazis, ke ŝi tiel zorgeme transdonis la servon, ĉirkaŭirante al ĉiuj gardejoj, ŝaltiloj, ke ŝi eĉ mem malfruiĝis ĉe la trajno, per kiu ŝi iris hejmen. Mi demandis, se ŝi sentis sin senkulpa, kial ŝi kaŝis sin en la lampodeponejo? Eble tial – respondis la olda fervojisto –, ĉar ŝi estis ja tamen virino, kaj eĉ viroj ne kuraĝus alfronti la furiozan amason. La fervojistoj ne disputis plu, eltrinkis sian vinon kun sodakvo, kaj foriris.

Nokte en la malplena loĝejo, mi enpensiĝis, ĉu ili pravas? Kvankam mi ne komprenas multe pri la fervoja laboro, mi serĉis pretekstojn kontraŭ ili, sed abrupte aperis antaŭ mi mem la virino kun okulvitroj, disetendanta senpove la brakojn, ĵuras, ke ŝi ŝaltis la semaforon je ruĝa, kaj senvorte toleras meti la ŝnuregon ĉirkaŭ la kolon. Tiam mi ankoraŭ ne kredis, sed ŝia mieno dum multaj noktoj reaperis al mi antaŭ la okuloj, kaj hodiaŭ mi jam sentas tiel – mi neniam scios certe –, ke la virino estis senkulpa.

Ekde tiam mi havas du mortintojn, pri la unua mi memoras dum la tuta jaro, por la alia tiel fine de aŭgusto mi aĉetas bukedon da floroj kaj portas ĝin al la relvojgardista dometo.

Tradukis: Imre *Szabó*

Hungara poezio

Sándor Petőfi
(1823–1849)

Mia unua rolo

Aktor' mi iĝis. Por komenc'
jen ricevita rol':
unue ridi sur scenej'
mi devis – sen parol'.

Kaj bonhumore – laŭ la dev' –
mi ridis, ho, el kor';
mi scias: estos sur ĉi voj'
kialoj eĉ por plor'.

Tradukis: Miklós Fehér

Malfermu por mi vojon...

Malfermu por mi vojon, sorto,
mi volas agi por homaro!
Ne estingiĝu senutile
ĉi nobla flam' en kor-amaro.

En mia kor' per flam' ĉiela
bolegas ĉiu sangoondo;
ĉiu korbato estas preĝo
por la feliĉ' de l' tuta mondo.

Ho, se mi povus ne per vortoj,
sed agoj ĉion ĉi rakonti!
Eĉ se pro mia ag' mi devus
Golgotan krucon mem alfronti!

Por bono de l' homaro morti!
Kiel beata morto bela!
Pli beatiga, bela ol voluptebrioj
de vakaj vivovoj' sencela.

Ho sort', eldiru, ke mi mortos tiel –
sanktule! ... kaj sen kor-ektrem'
per propraj manoj ĝoje mi starigos
la lignan krucon por mi mem!

Tradukis: Vilmos Benczik

Endre Ady
(1877–1919)

Kun Léda en la balo

Muĝas muziko, pintas ture, falas,
parfuma, juna ĝojvaporo ardas,
la rozkronitaj knaboj kaj knabinoj
ektreme paron nigran alrigardas.

„Vi kiuj?" Kaj nun mute ni enpaŝas
kun mortaj vangoj ombraj per vualo,
niajn malnovajn, sekajn rozokronojn
ni ĵetas dise tra la gaja balo.

Mortas muziko, vintra vento muĝas
tra la salono, mortas la lumaro.
Ekdancas ni kaj plore, frostotreme
disiĝas ĉiu gefianĉa paro.

Tradukis: Imre Szabó

La ĉevalo demandas

Sen hufa fer' mia ĉevalo lamas,
kia feliĉ', ke min neniu amas:
sur aĉa voj' mi min provadas tiri
kaj ne tre bone scias, kien iri.

Ĉar sur la voj' la mond' galopas fore,
mia ĉeval' foj-foje ekparole
demandas min, dum kap', la bela brulas:
hej, Moŝto, kien via viv' sin rulas?

Tradukis: Péter András Rados

János Pilinszky
(1921–1981)

Vi kombas vin

Alvenas kaj rigide strečas
sin al la cindromuta muro:
kolosa ununura bato
la luno. Mortsilenta duro.

Frakasas piste ĉiujn vojojn,
frakasas jen la lunarĝento.
Kaj ŝiras disde jam la muron.
Sur nigron blankas la torento.

Nur fulmas kaj nur fulmas, fulmas,
nur fulmas tiu nigra tago.
Torentas blanko kaj nigrego.
Vi kombas vin en la ŝtormatako.

Vi kombas vin en la silento,
en ĉi spegul' kun brilo guta.
Vi kombas vin en la spegulo,
kvazaŭ en vitroĉerko muta.

Tradukis: Imre Szabó

PANORAMO



Li Peng kaj György Lázár

Hungaraj-cinaj interrilatoj

Inter la 27-a de majo kaj la 1-a de junio – laŭ la invito de la hungara vic-ĉefministro József Marjai – vizitis Budapeŝton ĉina delegacio, kiun gvidis vic-ĉefministro Li Peng. La ĉefa temo de la intertraktoj estis ekonomiaj demandoj, nome, kiel pligrandigi la komercajn kontaktojn inter Hungario kaj Ĉinio. La valoro de eksporto kaj importo inter la du landoj dum la kuranta jaro kreskas je 50% kompare al 1984. József Marjai kaj Li Peng subskribis kontrakton pri la hungara-ĉina komerco dum la jaroj 1986-90.

Oni interkonsentis ankaŭ pri la kunlaborado kaj interŝanĝo de spertoj koncerne sciencteknikajn esplorojn kaj la reformon de la ekonomia direktado.

Komence de junio Budapeŝto akceptis pluajn ĉinajn gastojn: Jang Dajfang, ministron pri telekomunikado kaj poŝto, kaj Ĝou Ĝjennan, ministron pri maŝina industrio.



Balotoj en Hungario

La 8-an de junio okazis duobla balotado en Hungario: oni elektis novajn parlamentajn deputitojn kaj nove elektis ankaŭ la urbajn kaj komunumajn konsilantarojn (magistratojn). La balotojn partoprenis 94% de la personoj, havantaj balotrajton.

El la 352 balotdistriktoj en 307 unu el la kandidatoj ricevis la necesan nombron da voĉoj por elektiĝi deputito; en 45 balotdistriktoj estis necese organizi rebalotadon – tio okazis la 22-an de junio. 35 deputitoj estis elektitaj laŭ tn. „centra listo": sur tiu listo ricevis lokon gvidantoj de la partio, sindikatoj, junulara organizo, eklezioj, asocioj de naciaj minoritatoj ktp. La personoj sur tiu centra listo ricevis inter 98,8–99,2% de ĉiuj validaj voĉoj.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Jubilea kunveno en Budapeŝto

La 9-an de junio 1945 estis fondita la Hungara-Soveta Kultura Societo, kiu estis la unua hungara organizaĵo, celanta ampleksigi la kontaktojn inter Hungario kaj Sovetio. Okaze de la 40-jara datreveno de tiu historia evento la Hungara-Soveta Amikeca Societo en Budapeŝto okazigis festan kunvenon, kiun partoprenis ankaŭ pluraj sovetaj gastoj, interalie Filipp Jermas, prezidanto de la Soveta-Hungara Amikeca Societo.

En la kunveno János Berecz, sekretario de la CK de Hungara Socialisma Laborista Partio detale analizis la signifon de la hungara-soveta amikeco por la socia, ekonomia kaj kultura progreso de la hungara popolo. János Kádár, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato sendis gratulan leteron al la jubileanta Hungara-Soveta Amikeca Societo, alvokante ties membrojn por plua sukcesa kaj fruktoplena agado.

Kulturprogramo okaze de la jubileo

Vilaĝa turismo

Somere Balatono estas plenplena – multaj homoj faras grandan bruon, kaj tia medio ne aparte taŭgas por tiuj, kiuj ŝatas ripozi en silento.

Tial lastatempe ĉiam pli multaj urbanoj pasigas siajn feriojn en vilaĝoj, kiuj kuŝas ekster la kutimaj turismaj zonoj. En tiuj vilaĝoj la urbanoj povas ĝui naturajn cirkonstancojn, freŝan aeron, originalan atmosferon – kontraŭ tre modesta prezo. Dum la lastaj jaroj ankaŭ eksterlandaj turistoj – precipe el Okcidenta Eŭropo – volonte pasigas semajnon aŭ pli en hungaraj kamparaj domoj, foroferante la urban komforton por natura vivmaniero en nefalsita medio.

Karakteriza tradicia hungara kamparana domo



Dunántúli Regionális Vízmű és Vízgazdálkodási Vállalat

Siófok
Tanácsház u. 7.
H–8600



Profund-aerumiloj sur ponto — en la kloakakvopurigejo de Keszthely

La Transdanubia Regiona Entrepreno pri Akvoprovizo kaj -Mastrumo laboras sur triono de la lando. Krom akvon ĝi liveras ankaŭ industrio-akvon kaj purigas-forkondukas poluakvojn. La Entrepreno funkciigas irigaciajn instalaĵojn kaj kuracbanejojn, krom instalaj agadoj: teknika projektado, konstruado, muntado, disvolvo kaj fabrikado de tiucelaj establaĵoj kaj maŝinoj. El inter tiuj pluraj estis ekspoziciitaj ankaŭ en la Budapeŝta Internacia Foiro.

La instalajn agadojn de la Entrepreno karakterizas malaltaj spezoj kaj rapide faritaj projektado kaj konstruado. Pri la kvalito atestas multaj surfacaj akvoprovizejoj plenumantaj 2-3000 m^3/tago, kilometroj da eminente konstruitaj duktaroj, modernaj funkciigaj sistemoj. La Entrepreno renovigas malnoviĝintajn duktojn (precipe ŝtalajn) per plej modernaj metodoj: uzante la anglan metodon TATE por tubo-subŝtofado iĝas superflua la multekosta ŝanĝo de tuboj, kaj aldone la ŝtalduktoj restos dum 20-25 jaroj korodimunaj. Per tiu metodo la funkciigo de la duktoj kostas malpli kaj energio ŝpareblas.

Dum la lasta jardeko la Entrepreno disvolvis plurajn fabrikaĵojn, inter ili la familion de la profund-aerumiloj. Tiujn karakterizas granda plenumkapablo kaj elstara efikeco. Ekzemple, la plej nova varianto — RSK Turbo 2. — liveras en la akvon 1,8 kg da oksigeno per energio de nura 1 kWh! Tiuj estas eminente uzeblaj por aerumi poluakvon kaj vivajn akvojn, por senigi de fero, mangano kaj gaso.

La grandkapacita, neŝtopebla, traleva pumpilo de la Entrepreno estas bone utiligebla por traigi poluakvojn havantajn multe da fragmentaj materialpecoj.

La familio de la akvopurigiloj prezentas larĝan gamon de 1, 3, 6, 12, 25 kaj 50 m^3/horo. Tiuj estas rapide lokeblaj (eventuale tute mobilaj) kaj oni jam uzas ilin en multaj landoj de tri kontinentoj.

Pri elektronikaj instrumentoj la Entrepreno disvolvis plurajn patentojn. Inter ili akiris grandan sukceson la profundo-mezurilo SIGMA 1, kiu kontinue indikas laŭ centimetroj la altecon de kia ajn fluidaĵo. Oni uzas ĝin ĉe produktaj putoj, aŭtomatoj, per alia detektilo ankaŭ ĉe poluakvoj.

Akvopurigilo 1 m^3/h



Subŝtofado de tubo



Konstruado de tubo

REVUO DE REVUOJ

Aranĝi internacian konferencon pri lingvaj servoj apud UN en Novjorko kaj kunigi ĝin kun Zamenhof-festo, jam la trian fojon – fare de UEA kaj CED – estas multe pli ol sukcesa ideo. Kie partoprenas altranguloj de UN, interpretistoj kaj universitataj lingvistoj el 3 kontinentoj, tie Eo serioze eliris el nia interna rondo, el la klubatmosfero, kaj trafis ĝuste tiun profesian kaj influhavan medion, kie ni volas E-on uzigi kiel normalan komunikilon. Por paroli pri iliaj komunikadaj problemoj, ni vane atendas inviton. Sed kiam estas UEA (ties Novjorka oficejo) kiu invitas *ilin* diskuti pri siaj ĉiutagaj, praktikaj lingvoproblemoj, ili konsciiĝas pri la propra Babelo. Al tiu ili tro alkutimiĝis, eĉ apenaŭ pensas pri tio kiel forigi ĝin. Do flegante bonajn kontaktojn kun tiaj lingve interesataj medioj, ni pli kaj pli akceptigas la ideon de Eo kiel malstrangan ilon, kiel disponeblan kaj ekuzeblan rimedon por iliaj komunikadaj taskoj. Malfremdigi E-on en la gravaj medioj de la komunikado internacia restas ankoraŭ longe nia gravega strategia celo: endas do labori tiucele, kaj supre (kiel ĉiokaze), kaj sube, per gazetaro kaj personaj kontaktoj (ESPERANTO 2.).

La facilecon de nia lingvo ni ofte menciadas, same la fakton, ke oni pli rapide ellernas ĝin ol iun ajn nacian lingvon. Fakton ni aludas tiel, sed kutime sen pli precizaj indikoj. ISRAELA ESPERANTISTO (88.) publikigis rezonadon de Glasgova profesoro, *Stanley Nisbet,* kiu novmaniere ekzamenas la fenomenon. Li distingas 4 gradojn akireblajn dum lingvolernado. Tiuj estas: la baza, la sufiĉa (praktike uzebla ekz. dum vojaĝo), la flua kaj la majstra lingvoscio. Certe ne tute ekzakte, tiamaniere tamen eblas iom taksi la relativan tempon, kiu estas bezonata por atingi la menciitajn gradojn, ĉu en Eo, ĉu en ajna nacia lingvo.

Laŭ la diagramo de profesoro Nisbet – kompreneble surbaze de nerektaj pruvoj, tamen fidindaj – en Eo la grado „sufiĉeco" atingeblas dum *kvinono* de la tempo bezonata por nacia lingvo. Malpli ol *triono* da lernotempo ŝajnas necesa por atingi „fluecon" en Eo, kompare al aliaj lingvoj. Entute, bone utiligebla, praktika lingvoscio de Eo estas atingebla *multe tre rapide.* Tiun skizon ankoraŭ nuancigas individuaj trajtoj (konoj de lingvoj, k.a.). Certe, atingi „majstrecon": ĝui subtilajn nuancojn de la lingvo, esprimi sin laŭ delikataj pensoj, eĉ ĉe Eo bezonas multe da tempo kaj energio, kvankam nepre ne tiom multe kiel ĉe la naciaj lingvoj. Ĉi tiujn fremdulo ne povas vere majstri, nur certagrade. Nur enlande vivante eblas komplete regi – se entute eblas – la prononcon kaj la nacian pensmanieron, necesan ĉe amaso da specialaj esprimoj. Kiel bagatele malmultaj estas eĉ la plej vivplenaj formulitaĵoj de nia lingvo, eventuale troveblaj en nia plena vortaro!

En PACO (1.) *Violin Oljanov* emfazas, ke eĉ la plurfoje lanĉita afero de la landnomoj prezentas nenian malfacilaĵon al lernantoj, precipe se oni konsideras la diversecojn en la naciaj lingvoj tiurilate. Tamen pro tiuj neniu plendas pri kaosa situacio, akademioj ne emas krei novan „ordon", ne plendas lernantoj. La aŭtoro multrilate argumentas, ke tiuterene severa – se vera? – uniformeco tute ne bezonatas, nek enkonduko de novaj sufiksoj. La tiurilataj nocioj (ŝtataneco, loĝantoj, k.s.) estas klare esprimeblaj per tradiciaj lingvaj rimedoj; tial Oljanov rifuzas la troan precizigon, kiu farus nian lingvon superflue komplika, anstataŭ pli facile uzebla.

Fiera bilanco legeblas en HEROLDO (4-5.): 460 stratoj (placoj, monumentoj, k.s.) portas la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto en 29 landoj ! Tre-tre grave, ke tabuloj kaj monumentoj memorigas publike pri nia movado, helpas konigi ĝian nomon. Eĉ pli taŭgas, se la tabuloj donas iom da klarigo. La nombro de tiuj bone rimarkeblaj propagandiloj (senpagaj!) dum la lastaj jardekoj *duobliĝis,* laŭte anoncantaj aŭtoritatan rekonon kaj prestiĝon de la movado. Estas malfacile kompreni, pro kio en multaj landoj oni apenaŭ utiligis tiun *stabilan* „insignon"? Ne por memcela plilongigo de la publikita listo (aparte mendebla!), sed *por firmigi nian renomon* ankaŭ per tiu rimedo, ni forte atentigas pri tiu bonvena „oficialigo" de la Internacia Lingvo en la tempo de la vastiĝanta urbanizado.

Cetere en la sama numero, ni tre volonte „migris" tra la urbo *Aŭgsburgo* kun *Hermann Schmid* – gvidanto en la „kongresa suplemento" – inter la tradiciaj vidindaĵoj kaj artplenaj monumentoj de la mezepoka metropolo. La 70a UK-urbo multajn altiros kaj igos ĝui la ĉarmegan etoson, la romantikajn akvojn kaj pontojn, la ĉie troveblajn artaĵojn, apud la serioza (kaj amuza) kongresa programo.

Estas gorĝpreme tralegi – sincere mi konfesas – la paĝojn en BULGARA ESPERANTISTO (12., 1.), kie longelonge viciĝas – ĝis n-ro 227! – la esperantistoj, kiuj dum du jardekoj pereis batalinte kontraŭ la faŝismo. En la montarplena patrujo, en Hispanio kiel anoj de la Internaciaj Brigadoj, surfronte de la dua mondmilito en la Ruĝa Armeo ili luktis ĝismorte. Mi legas ĉe la nomoj ripete: mortpafita aŭ pendigita en malliberejo, falinta en montpasejo aŭ apud Madrido, mortigita en koncentrejo kune kun aliaj, kun sia patro, kun partizanoj... Viroj kaj virinoj, ĉiuj esperantistoj, patriotaj internaciistoj – pri kiuj omaĝe memori indas je la *40-jara jubileo* de la triumfo super la Eŭropon turmentinta faŝismo.

Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

POLIGAMIO

La edzino forveturis por resti tri tagojn ĉe la gepatroj. Kiam ŝi alvenis hejmen unu tagon pli frue kaj malfermis la pordon, ŝi trovis la edzon en la lito – kun knabino. La pintnaza, helbukla bubineto dolĉe dormis. La edzo teruriĝinte puŝis la knabinon: Vekiĝu! Venis mia edzino!

La edzino konsterniĝis kaj pale, svene falis en la brakseĝon. La timiĝinta edzo kuris por vinagro kaj ekfrotis ŝian frunton, provante ŝin per vortoj kaj karesoj trankviligi. La knabino hastekapte vestis sin, kaj infanece salutante la paron forlasis la domon. Ankoraŭ duonsvene pro la travivaĵo, la edzino fiksis mire grandajn okulojn al sia edzo, Klarigu – fine ŝi eligis – kiel venis en nian liton tiu nuda virinaĉo? Kiel povas esti tiel impertinenta, tiel senhonta viro kvindek-jara, jam de 25 jaroj edziĝinta? Edzo kiu havas plenkreskintajn infanojn, eĉ nepojn? ... Kiel? Kiel? Tiel profiti, ke lia edzino forestas... kaj kunporti inojn en la loĝejon!

Kvazaŭ li ne komprenus la virinan panikon, tiel ŝin alrigardas la edzo.Kial incitas sin la edzino, kiu devas scii tre bone, ke ŝi devas ekscitiĝojn eviti pro sia koro. Kiucele ja tiu paniko? Nenio vere grava, okazis nur simpla afero, ne estas sekretoj en ĝi. Li rakontas sincervorte:

– Ĝis la malfrua vespero mi laboris en la oficejo, ĝis mi bezonis freŝan aeron pro laciĝo. Mi ensidis en mian aŭton kaj veturis al la monteto. Por bani mian kapon en la aero, komencis promeni en la arbareto, kiam mi abrupte rimarkis ian blankaĵon en la herbo. Tiu ĉi knabino kuŝis tie, kiun vi ĵus trovis kun mi. Pro timo, ke io malbona okazis al ŝi, mi klopodis veki ŝin. Baldaŭ ŝi rekonsciiĝis, kaj rakontis pri si. Kiel studentino, ŝi loĝas en studenthejmo. Nun, fine de la lernojaro ŝi restis sen mono kaj ekiris perpiede al siaj gepatroj. Dum la vojo ŝi ege laciĝis kaj tie ekdormis.

La edzino ekmiris, kiel flue mensogas la edzo. Sed la edzo rakontis plu.

– Mi portis hejmen la knabinon, tio estis ja mia homa devo. Mi sendis ŝin en la banĉambron, donis al ŝi varman teon kaj manĝaĵon. Fine ŝi kuŝis en la liton, sen mi kompreneble, kaj ŝi profunde dormis ĝis vi alvenis...

La edzino rememoris, ke la foririnta knabino kunportis nenian pakaĵon, nur etan mansakon. La edzo do senhonte mensogas, banalan fabelon, ne konvenan eĉ por etinfanoj... Restas do nenia vojo alia... ja, disiĝi... kiel eblas vivi kun viro, kapabla je tia konduto. Tamen, tamen, se eble li diskrete farus sian fiaĵon, ŝi eble pardonus la kulpon, ne maleblas... Sed kion li meritas farinte tiamaniere?

La edzo longe rigardis ŝin. Mildavoĉe li ekdemandis:

– Kial vi silentas? ... Ĉu vi ne kredas, ke mi agis nur humanece?

– Lasu min trankvila... mi devas pripensi vian fiagon! – ŝi kolere ĵetis rigardon al la viro.

Li humile eksidis apud la kamenon, kaj glutis el brando. Ŝiaj pensoj turniĝis en ŝia kapo: kien iri de tiu domo? Ĉu reiri al la vilaĝo, kie vivas la gepatroj ? Lasi sian laboron ĉi tie? ... Aŭ al sia filino, kiu loĝas en alia urboparto ? Sed ties edzo estas flutisto, kiu ofte ekzercas sin, eĉ la nepino estas malfacile tolereble kapricema... Eblus translokiĝi eventuale al la filo, tamen la bofilino naŭze kuras post ĉia klaŭna modo, kaj ĉambron apartigeblan ili ne havas. Nu, estas amikino volonte akceptonta ŝin, ili kune vivos tie, du eksedzinoj... Eble rekomenci kun alia viro? Kiu certigos ŝin pri lia vera karaktero, kaj se li same adultos, eble pli malfidele ol la nuna edzo? ... Kion fari? Foriĝi aŭ ne?

Neatendite venis gastoj. Amikino kun filino, kiu forlasis antaŭ monatoj la edzon. Li tagojn longe kunestis kun sia kolegino, eĉ semajnon kunloĝis kun ŝi en iu ripozejo, la disiĝo ne estis evitebla – rakontis la juna patrino.

– Ni esperas ricevi konsilon de vi – ŝi diris –, vi kunvivas harmonie, do vi trankvile povas niajn zorgojn pripensi...

La alcelitaj gastigantoj nur interrigardis malgaje, kun amaraj pensoj ili minuton silentis, kvazaŭ rompus la kapon pro la forlasita edzeto. Finfine la viro kuraĝis demandi:

– Kiel ekskuzis sin via edzo?

– Li konfesis, ke li havas poligamian naturon. Por li ne sifuĉis unu virino, imagu! ... Tamen, laŭ li, mi estas la sola kiun li amas! Li montris gazeton, kie estas legebla, ke en Bangladeŝa urbo vivas 104-jaraĝa mahometano, havanta kvar edzinojn. Kaj tiu maljunulo nun edzinigas junan knabinon, asertante ke la homo estas grupa estulo...

– Viroj similas al kokoj – diris la dommastrino. – Iu adultas sekrete, aliulo senkaŝe, kaj sincere parolas pri siaj aferoj... Kaj tiu ŝajnas al mi pli simpatia. Sed la vera solvo estas, laŭ mia opinio, la disiĝo...

Kiam la gastoj foriris, la edzo mallaŭte ekparolis:

– Kion vi meditas, mia kara?

La edzino laŭte ekploris, longe-longe ŝi singulte ploris. Poste ŝi ŝanĝis ĉiujn litaĵojn. Enlitiĝante ŝi decide diris:

Kara Leganto! La redakcio ne konas la decidon de la edzino, tial mi petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion kaj la solvo aperos en Hungara Vivo. Limdato: unu monato post la alveno de tiu ĉi historio.

LEO WEINER

(1885—1960)

Li naskiĝis 1885-04-16 en Budapeŝto, kaj tie li pasigis la tutan vivon. En la Muzikakademio li estis disĉiplo de János *Koessler* inter la jaroj 1901—1906, samtempe kaj en la sama klaso kun Zoltán *Kodály*. Atentindan progreson li atingis precipe en la lastaj du jaroj, kiam lia profesoro sendube konstatis, ke inter liaj disĉiploj Weiner estas la plej matura sur la tereno de la muzika majstreco kaj memesprimo.

Ekde 1908 ĝis sia morto ankaŭ li mem instruis en la Muzikakademio. Kiel ĉefo de la kamermuzika katedro, dum duonjarcento li instruis plurajn generaciojn de instrumentaj artistoj. La mondfamaj virtuozoj hungaraj preskaŭ senescepte apartenis al la disĉiplaro de Weiner. El lia pedagogia laboro fruktis pluraj muzikteoriaj lernolibroj kaj analizoj.

Malgraŭ tio, ke lia kariero kronologie tute koincidis kun tiu de *Bartók* kaj *Kodály*, tamen liaj inklinoj fundamente kondukis lin en alian direkton. Kiel komponisto kaj praktika muzikisto dum sia tuta vivo li kune vivis kun la verkaĵoj de la Eŭropa muzikarto,



precipe kun la Viena klasikismo: li kredis, ke oni eĉ en la dudeka jarcento ne povas superi tiun perfektan kaj plenecon radiantan muzikon. En tiu senco lia verkaro vere estas Eŭrop-karaktera, ne nur en ĝia nivelo, sed ankaŭ en ĝia strukturo. Lia personeco, emocimondo destinis lin por gardi kaj plu vivigi la harmoniajn kaj melodiajn solvojn. Li ne aparte celis malkovri la hungaran popolmuzikon, tamen utiligis ĝin en sia muzika stilo. Speciale grandan sukceson li rikoltis per sia „2-a violon-piana sonato", krome per la Coolidge-premiita „2-a arĉ-kvarteto". La pian-verkaĵo „Concertion" atingis mondan sukceson.

La laboro de Weiner dekomence okazis sur du paralelaj terenoj: li estis komponisto kaj samtempe muzikakademia profesoro. Post la dua mondmilito oni akceptis lian agadon per speciala honoro kaj rekono. Oni eldonis liajn verkaĵojn kaj dufoje distingis lin per Kossuth-premio. El liaj orkestraj verkoj elstaras la „Hungaraj kamparanaj kantoj", kaj la simfonia poemo „Toldi".

Per lia morto en 1960 foriris granda figuro de la hungara muzika vivo, „malfrua klasika majstro" de la dudeka jarcento, neforgesebla muzikprofesoro, unu el la plej elstaraj komprenantoj de la muzikarto.

István *László*

Daŭrigo

de la novelo „La malfacila decido"

aperinta en la numero 1984/5

Daŭrigas: István Bálint, Kecskemét, H.

Elizabeta havis multe da silentaj minutoj dum la noktaj deĵoroj. Estante tre inteligenta kaj racia virino, ŝi uzis tiun tempon por bone kaj profunde mediti pri sia vivo, pri la pasintaj jaroj kaj same pri sia estonto. Ŝi devis iom malgaje rimarki, ke la elekto inter la du amikoj ne estas facila kaj ĝuste pro tio, ke ŝi ne sentas veran amon, krom la amikeco neniu el la junuloj sukcesis tuŝi ŝiajn plej intimajn virinajn sentojn.

Ŝi ofte vizitis la tombejon, kie kuŝis la antaŭ ne tre longe forpasintaj gepatroj. Ankaŭ tie ŝi kutimis mediti pri sia eventuala familio, pri la deziratai infanoj, kvazaŭ la tomboj de la gepatroj pli instigus ŝin enprofundiĝi en sian memon. Ofte ŝi vidis tie same funebrantan viron, kiu kun ĝardenista sperto flegis la tombon de sia patrino. Li ĝentile donis konsilojn foje al Elizabeta pri ŝiaj floroj, kondutis serioze, portis eĉ akvon de la puto, kaj preskaŭ neeviteble komenciĝis kiel inter samsortanoj interparoloj... baldaŭ ankaŭ ekster la tombejo. Kaj disvolviĝis tio, kio ofte okazas en la vivo: el la samaj sentoj ekburĝonis multe pli ol kion Elizabeta iam imagis. Ŝi eksentis ion pli profundan, ĝis iutage konfesis al si, ke ŝi jam *amas*, kaj magnete tiriĝas al tiu ĉi nova amiko, fakte pli belaspekta ol Johano kaj Petro. Finfine Elizabeta elektis la trian viron, kiu ankaŭ petis ŝin por si.

Jen, tombejo ne ĉiam signifas nur morton...

István Nemere

LA TREZORO

3.
La persekutatoj

Tiuvespere Petro sukcesis trompi la persekutantojn – almenaŭ tion li kredis – kaj kun Laŭra sen klopodoj li revenis al la loĝejo de la onklino. Onklino Gracia komence nenion komprenis. Kial ekloĝis ĉe ŝi la „infanoj"? Petro diris, ke pro la malfrua horo li ne nun, sed morgaŭ klarigos al ŝi ĉion.

Sed kiam onklino Gracia sekvontage vekiĝis, la gejunuloj jam foriris por labori. La onklino iom enpensiĝante rigardis la liton en la gastoĉambro, poste eliris aĉetadi. Ŝi ne rimarkis, ke sur la tuta vojo – eĉ ĉe la virinaj vestaĵoj en la magazeno – postsekvis ŝin iu malalta, sensignife aspektanta, ledjaka viro. „Nu, posttagmeze mi fortvoĉe parolos kun ili! " – ŝi promesis al si revenante.

Sed tion ŝi ne povis facile realigi, ĉar dum la tagmanĝa paŭzo Petro ekhavis bonegan ekpenson. Tuj li telefonis al Laŭra:

– Aŭskultu, karega, mi aranĝis ĉe mia ĉefo, ke posttagmeze unu horon pli frue mi liberiĝos. Mi luos aŭton, por ke ni povu libere moviĝi en la urbo, por ke ni ne devu atendi taksiojn en eventualaj malagrablaj situacioj, vi komprenas, ĉu...? Mi veturos al via oficejo kaj ni kune iros al la notario.

– Ĉu vi opinias, ke li scias ankoraŭ ion, kion li ne diris al ni?

– Mi kredas, ke jes. Aŭ almenaŭ mi volos demandi lin pri kelkaj aferoj.

– En ordo.

* *

Petro luis malhelverdan, ne tro grandan, simplan aŭton, per ĝi li alvenis antaŭ la oficejo de Laŭra. Kiam la edzino ensidiĝis, li tuj ekveturis. Ankaŭ ŝi kondutis kvazaŭ vera kaj profesia komplotistino; aŭ almenaŭ ŝi tion kredis pri si. Dumvoje Laŭra ofte ĵetis flanken kaj malantaŭen atentemajn rigardojn, serĉanta suspektajn aŭtojn – sed neniu postsekvis ilin.

Antaŭ la domo de la notario ili feliĉe trovis lokon por restigi la aŭton. Sur la ŝtuparo Laŭra premiĝis al Petro:

– Mi timas.

– Kion? Ne estas kaŭzo. Ĉi tie estas oficejo.

En la jam konata antaŭĉambro de la notaria oficejo, inter la ligne kovritaj muroj la sekretariino – maljuna fraŭlino – akceptis ilin kun stranga mieno:

– Bon' tag', ni ŝatus interparoli kun la sinjoro notario.

– Do, vi ne scias, kio okazis? – ŝi rigardis al la gejunuloj severe, tamen senespere.

– Ni scias nenion – kaj la gorĝon de Laŭra premis timo jam kvazaŭ konata.

– Post la tagmanĝo vizitis lin klienTo. Tiam la sinjoro notario subite ekfartis malbonege, apenaŭ li scipovis spiri... Tuj mi telefonis al kuracisto. Antaŭ horo oni lin transportis al hospitalo – survizaĝe de la sekretariino estis tiom da timzorgo, ke ili ne plu demandis ion. Senvorte ili forlasis la oficejon. Sur la ŝtuparo Laŭra diris nur tion:

– Ŝi amas sian ĉefon.

– Ankaŭ tion kulpas „tiuj" – respondis la edzo enpensiĝinte.

– Kio...? Ŝi amas la ĉefon pro la banditoj? – rondiĝis la okuloj de Laŭra. Petro malpacience mansvingis:

– Mi parolas pri la notario! Sendube „ili" opinias, ke li scias pli multe pri la afero kaj provis lin mortigi.

– Se tio veras, do ankaŭ ni ne vivos longe – aldonis la junedzino malbonhumore. Ili ĝuste atingis la trotuaron. Laŭra observis la sunoplenan straton, enspiris la varman aeron. Morti ...? Ĝuste nun, preskaŭ komence de la vivo?

– Mi ĝojus, se vi erare antaŭvidus la futuron – diris Petro. Ili denove sidiĝis en la aŭton kaj ekveturis. Li pensis, ke bone estus nun aŭte promenveturi al iu parkego ĉeurba, pripensi, kion fari. Sed kien...?

Laŭra retroturnis sin, jam per kutima movo. Ŝi tuj kaptis lian ŝultron:

– Jen, ili!

Petro ne tro miris. Senvole li akcelis la aŭton. Sed en tiu posttagmeza horo estis sufiĉe granda trafiko, do ili ne povis fuĝi. Laŭra vidis ankaŭ nun grandan, nigran aŭton, en ĝi sidis du viroj. Ŝi ne vidis iliajn vizaĝojn. „Senvizaĝuloj", ŝi pensis senespere.

– Ĉu mi restu en la urbocentro, aŭ ni veturu ekster la urbon, por provi liberiĝi de ili? – demandis Petro nervoze. Laŭra, vidante lian nervoziĝon,

subite fariĝis trankvila. „Unu el la geedzoj devas gardi sian dignon", ŝi pensis kaj subite ekmemoris sian patron. Ĉu ankaŭ li travivis tiajn minutojn? Aŭ... ĉu lia tuta vivo estis tia? „Se li elportis, do ankaŭ mi elportos! Ja mi estas lia filino! "

– Restu en la centro – ŝi ordonis, kaj Petro obeis. Ili veturis sur la ĉefa avenuo. La nigra aŭto provis proksimiĝi al ili, sed ne povis forlasi sian koridoron. En konvena momento Petro sukcesis pasi al la dekstra koridoro:

– Ĉe la angulo ni veturos dekstren! Ili eble ne povos fari la samon!

Li veturis dekstren, sed bedaŭrinde ankaŭ la banditoj sukcesis tion fari. Danĝere proksimiĝis ilia aŭto... Petro lastmomente alveturis alian larĝan avenuon. Kion ajn li faris, la nigra aŭto ĉiam restis malantaŭ ili.

– Ili nur atendas la konvenan minuton.

– Konvenan, je kio? – ŝi demandis.

– Por nin mortigi.

La frazo sonis tiel simple, tamen sugestis tiom da danĝero. Laŭra englutis la salivon kaj observis plu retrodirekte.

La nigra aŭto denove estis pli proksime, jam preskaŭ malantaŭ ili. Petro provis akceli foje maldekstren, foje dekstren, sur aliajn koridorojn – sed sensukcese. Laŭra jam kvazaŭ vidis – kiel en filmoj – ke la banditoj malfermas la fenestrojn de sia aŭto kaj komencas pafadi al ili el revolveroj...

Tiam okazis io stranga.

La geedzoj aŭdis bruegon. Sed tio ne estis pafo. Antaŭ la aŭton de banditoj, el la interna vojstrio subite elveturis iu blua aŭto. La du veturiloj karambolis.

– Rigardu, Petro!

– Mi vidas – li ĵetis rigardon tra la retrospegulo kaj akcelis la veturilon. Ili sciis: la persekutantoj hodiaŭ jam ne trovos ilin... El la motoro de la nigra aŭto eliĝis fumo. Ĝiaj pasaĝeroj elsaltis. La trafiko obstrukciiĝis.

– Ni estas savitaj! – ĝojegis Laŭra.

* *

En tria veturilo la svelta, larĝŝultra junulo kun enua mieno rigardis la karambolitajn aŭtojn, kaj diris al sia kunulo:

– La knaboj bone tion faris. Poste mi laŭdos ilin. Sed nun ni singarde postveturu Laŭran kaj Petron...

Onklino Gracia konsternita akceptis ilin. La grizaj haroj tremis, la nazo moviĝetis kiel nazeto de leporo, samtempe ŝi rapidege palpebrumetis pro la ekscito:

– Imagu, iu rompŝtelisto venis en la loĝejon.

– Jam? – miris Laŭra.

– Kion signifas, ke „jam"? – la onklino super la okulvitroj ĵetis al ŝi severan rigardon. – Ĉu vi eble atendis tion...? Nu, mi aŭdis, ke iu ekstere manipulas ĉe la seruro de la pordo. Jam estis sufiĉe malhele, preskaŭ vespere. Mi malŝaltis la lampojn, prenis la fertenilan ombrelon kaj kaŝis min en la antaŭĉambro. La rompŝtelisto malfermis la pordon, envenis... kaj tiam mi bategis lian kapon. Li svenis.

– Ĉu...? – konsterniĝis Petro. – Kaj k-k-kie li n-n-nun estas?

– Mi lin ligis per ŝnuregoj kaj provizore fermis en la banĉambron – respondis la onklino trankvile.

(Daŭrigota)

Sagacaj antikvuloj

„Kiom da homoj povis transporti tiun ĉi Egiptan koloson? " Certe jam multaj faris tiun demandon, rigardante la bildojn de piramidoj kaj gigantaj skulptaĵoj.

La respondon donis C. Davidson, esploristo de la Londona Scienca Muzeo. Jen, lia klarigo:

La bildo bone montras, pri kio temas. Ĝia originalo, pentrita en la jaro 1880 a.K., estas videbla en Egiptujo, en groto ĉe El-Bershehi.

Bone estas videbla la kolosa statuo, kiun – sur speciala „sledo" –, tiras 172 homoj. (Kiu havas bonajn okulojn, tiu kontrolu!) Unu viro staras sur la sledo kaj verŝas iaspecan fluaĵon antaŭ la sledon. Sur la maldekstra, malsupra parto de la bildo videblas tri viroj, portantaj longan breton, aliaj tri portas kruĉojn.

Ni supozu, ke la kruĉoj enhavas iaspecan „lubrikaĵon". Sed se ili estus verŝintaj tion sur la sablon, la tuto valorus nenion. Sed se la breto estas metita sub la sledon, kaj sur ĝin oni verŝas la „lubrikaĵon", tiam signife malpliiĝas la frotiĝo de la sledo. Tiel oni povas atingi du rezultojn: la laboro bezonas signife malpli da homoj, kaj due, la sledo ne frotiĝas tiel forte kaj sekve ĝi ne foruziĝas tiel rapide. La pezo de la tuto estas ĉirkaŭ 60 tunoj.

Ni pensu pri la frotiĝfaktoro. Tiu ĉi cifero esprimas la fortecon de la frotiĝo. Se lignaĵo glitas sur lignaĵo, tiu ĉi cifero estas sen lubrikaĵo 0,35, kun lubrikaĵo 0,16.

Oni kalkulis ankaŭ la tir-forton de unu viro: ĝi estas 54 kilopondoj.

Do, la kalkulado de la afero aspektas jene laŭ matematika formulo:

$$\textit{La nombro de la tirantoj} = \frac{\textit{frotiĝfaktoro plena pezo}}{\textit{tiroforto de unu homo}}$$

$$\frac{0{,}16 \times 60\,000}{54} = 177 \text{ viroj}$$

Do, nia kalkulo estas proksima al la laŭbilda nombro de la tirantoj.

Sen lubrikaĵo tiu ĉi grandega laboro bezonus ĉirkaŭ 400 homojn.

La antikvuloj estis prudentaj: ili ko- ĉion ĉi. Ankaŭ ni agas same kont-

La antikvuloj estis prudentaj: ili konis ĉion ĉi. Ankaŭ ni agas same kontraŭ la frotiĝa forto.

Tibor *Beŝŝenyei*

Murpentraĵo el la groto de El-Bershehi



SCIENCFIKCIE EL URALO

– Intervjuo kun Vitalij Bugrov –

„Uraljskij Sledopyt", ekde 1958 eldonata en Sverdlovsk, estas verŝajne la sola el la zonaj (nemetropolaj) revuoj aperantaj en Sovetio, kiu ne nur kapablas konkurenci kun la centraj, sed superas plejparton el ili kaj laŭ la eldonkvanto kaj laŭ la legantara intereso. Tiu fakto instigis nin turni nin al la ĉefa redaktoro de la revuo Stanislav F. *Meŝavkin.* Li rakontis, ke, iniciatita kiel Urala revuo por junularo, US jam delonge konkeris simpatiojn de legantoj junaj kaj oldaj, ĝi estis amase legata en Siberio kaj Kazaĥio, en Ukrainio kaj Meza Rusio, en Cebaltio kaj certe en Uralo. Ĝi multaspekte malsimilas al stereotipo de la zona periodaĵo; t.e. multfaceta demonstro de historiesplora kaj de skolta agadoj, abundo de la t.n. „aventura" literaturo..., sed eblas preskaŭ certe aserti, ke plejmultaj legantoj de US asocias ĝin al sciencfikcio. Do, laŭ la sugesto de Stanislav *Meŝavkin,* ni iras daŭrigi nian konverson al la kabineto de la redaktoro de la scifia fako de „Sledopyt", literaturisto kaj esploranto de SF Vitalij *Bugrov.*

Verŝajne, la popularecon de „Uraljskij Sledopyt", speciale en la junularaj rondoj, provokis tio, ke la revuo metas tiom grandan atenton al SF, sed kio kaŭzis la popularecon de SF mem, kiu en nia lando dum kelkaj jardekoj ludis la rolon de „Cindrulino"?

La renaskiĝo de la scifia literaturo komenciĝis en Sovetio en 1950-aj jaroj kaj la kialoj estas kompreneblaj: kaj la unuaj sputnikoj signintaj la eniron de la homaro en la kosman arenon, kaj la ĝenerala ofensivo de la scienc-teknika revolucio, kaj kibernetiko kaj genetiko – estis realigita tio, kio estis pli frue aŭgurita kaj skizita far SF. Tiu ĉi reala manifestiĝo de SF multplikita je la konataj sociaj ŝanĝoj (kiuj helpis revivigi ankaŭ E-on en la lando – AK) naskis la furoron, kiu ne ĉesas ĝis nun: SF forlasis la literaturan periferion. Tamen tiu ĉi kontakto de la scienc-teknika revolucio kun SF havis ankaŭ negativan flankon – oni daŭrigis opinii la sciencfikcion nur speco de literaturo propaganta la atingojn kaj estontan evoluon de la scienco. Tio, certagrade, ankaŭ nun limigas la eblojn, ĉar la aŭtoroj estas devigataj intime ligi siajn verkojn al la scienco kaj tre rare produktas fantaston.

Sed al mi ŝajnas, ke estas kroma kaŭzo de la sukceso de SF – ja nun oni jam alkutimiĝis al realaj mirakloj, kaj SF ne plu surprizas per freŝeco de la ideoj. Ĝi populariĝas ne nur pro tio, ke ĝi malbremsas, malpliigas la inertecon de la pensado, evoluigas la fantazion, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi grandgrade plenumas la rolon de la moderna „aventura" legado. Pure aventura literaturo nun ne plu ekzistas. La entute bone procedo de psikologiigo de la beletro, ofte transformiĝanta je malheroigo, kondukis al tio, ke, ekzemple, eĉ la geologoj – la plej romantikaj kaj aktivaj protagonistoj – iĝis nur konfuzitaj veantoj, pasivaj suferantoj, ĉiaspecaj „hejmaj filozofoj". Restis nur krim-ĝenro, kiu ne al ĉiu plaĉas kaj milit- kaj historiaventura literaturo, sed ankaŭ tiuj spertis la psikologiigon. Evidente pro tio SF debutinta kiel akre romantika literaturo okupis la lokon de la aventuroj, tiele reveninta al la „granda" literaturo, ja la homo nature bezonas tian leg-materialon.

Oni ofte traktas sciencfikcion kaj fantaston metante ĝin ekster la t.n. „granda" literaturo, sed kiom validas tiu ekstraktigo? Ja ankaŭ SF subiĝas al ĝiaj ĝeneralaj leĝoj, ĉu ne?

Jes, certe. SF estas nur parto, ĝenro de la literaturo, kaj en ĝi necese respeguliĝas la ĝeneralliteraturaj tendencoj. Nu, ekzemple, ankaŭ la supre menciita psikologiigo lastatempe penetras en SF-on. Jen plia ekzemplo: kiam la literaturo kliniĝis al la industria romano, komenciĝis ĝia poluado, transformiĝo de la romanoj je industriaj raportoj; tiu emo aperis ankaŭ, preskaŭ nerimarkite, en la scifiaj verkoj. Nu, la kriterioj estas tre svagaj, kaj estas malfacile verdikti: tio estas scifia kaj tio – ne. Eblas kompari bibliotekojn de du SF-amatoroj, kaj ni vidos, ke iliaj konceptoj pri SF malkoincidas. Ja scifia kaj fantasta elemento estas ĉe *Radiŝčev, Gogolj, Saltykov-Ŝčedrin, Čehov, Dostojevskij, Hlebnikov, Severjanin, Bulgakov, Ajtmatov, Voznesenskij* kaj pliaj, kiujn oni ne opinias verkistoj scifiaj. Se ni apartigas SF-on kiel ĝenron, ni faras tion, ke ĝi ne malaperu kaj ne dissolviĝu entute en la granda beletra maro: ja ni bezonas ĝin.

Ĉu tio estas karakteriza por la tuta SF aŭ nur por la nialanda?

Mi legas nur tion, kion oni tradukas en la rusan, sed mi pensas, ke por Okcidento tio ne estas karakteriza –

Vitalij Bugrov legas Hungaran Vivon

tie SF-industrio ekzistas kvazaŭ sendepende: ĝi kvazaŭ apartiĝas kaj evoluas laŭ siaj leĝoj ensorbante eĉ tion kio naskiĝas en la tradicia literaturo. Abunde eldonatas specialaj SF-revuoj (evidente, ne ĉiam bonkvalitaj). En Usono, ekzemple, aperas 600-700 novaĵoj jare, kiuj ekspluatas kaj varmigas la publikan intereson.

Ni revenu al US. Sciate, ke la unua provo eldoni la revuon estis entreprenita ankoraŭ en la 1930-aj jaroj, ĉu eblas diri, ke US reprenis la torĉon ĉe la iam famega revuo „Vsemirnyj Sledopyt"?

Nu, ni ja ne apostatas! Des pli, ke estas rekta stafeto. VS-on eldonis V.A. *Popov*, tre malnova redaktoro kiu redaktis ankaŭ la antaŭrevolucian „Vokrug Sveta" (Ĉirkaŭ la Mondo). Komence de la 1930-aj, kiam VS ĉesis, Popov iris al Uralo kaj 1935 ekeldonis la revuon ĉi tie sub la titolo „Uraljskij Sledopyt" (Urala Skolto, Urala Spursekvanto), tiam eĉ la literaro, titoloj kaj formato estis tiuj de „Vsemirnyj Sledopyt". Sed ne estis sufiĉa bazo, kaj aperis nur naŭ kajeroj.

Sed kiel aperis tiu „Sledopyt", kiun ni konas, kaj kiel ekfloris en ĝi la sciencfikcia literaturo?

Ĝi ekaperis en 1958, kvindekmilekzemplere, samkiel nun sur 80 paĝoj. SF estis jam en la unua numero – krom ĉio cetera tie estis la scifia rakonto de Aleksandr *Beljajev* „Blinda Flugo", verkita ankoraŭ por la intermilita US – tio akcelis la tradicion. Sed baldaŭ oni eluzis la tutan redaktoran tekon kaj SF ĉesis esti konstanta temo. Al la fino de la 1960-aj, kiam mi eklaboris en la redakcio, ĝi estis aperanta nur sporade, 2-3 foje jare. Tamen mi iompost-iom sukcesis ree igi ĝin konstanta rubriko, certe al tio multe kontribuis ĉefredaktoro Stanislav *Meŝavkin*.

Sed la sekreto de la popularegeco estas videble ne en tio. Nun fakte ĉiuj scienc-popularaj revuoj publicas SF-on. „Vokrug Sveta" (Ĉirkaŭ la mondo), „Teĥnika Molodjofi" (Tekniko – al la junularo), „Himija i Ĵiznj" (Kemio kaj vivo), „Ĉelovek i Priroda" (Homo kaj naturo), kotopo, jen aperis nova revuo „Energija" (Energio) – ili aperigas SF-on ĉiunumere, sed ĝi plu restas tie nur unu el la akcesoraj rubrikoj, kaj nur en US ĝi iĝis fenomeno.



Ekzakte tiel. Antaŭ ĉio, ni aperigas principe nur la sovetian sciencfikcion; niajn renomajn majstrojn (en la revuo publikiĝis D. *Bilenkin*, K. *Bulyĉjov*, G. *Aljtov*, G. *Gurevič*, A. *Dneprov*, A. *Kazancev* – tiun vicon eblas daŭrigi!), kaj, nelastvice, junajn aŭtorojn, kiuj nur ekverkas. Post kiam SF ekmarŝis ĉiunumere, ni riskis pluiri: estis lanĉita nova rubriko „Moj drug fantastika" (SF – la amiko) kun diversaspektaj artikoloj pri SF. La sekva etapo estis konkursoj-kvizoj, helpe de kiuj ni faris rektan kontakton kun la legantoj. Plue, en 1978 US organizis la unuan zonan (ne en Moskvo kaj Leningrad) konferencon de verkistoj-aventuristoj kaj SF-istoj – ĝia sukceso grave kontribuis al la plifirmigo de la pozicio de SF en la revuo.

Eble la plej interesa iniciato de US estis fondo de la premio „Aelita" en 1981, ja ne estis precendencoj por tio kaj necesis granda kuraĝo fondi ĝin ne en la centro.

Tio estis vere pionira paŝo, por la unua fojo en la historio de la sovetia SF al

MOZAIKO EL ESPERANTUJO

Printempa renkontiĝo de pacdefendantoj

La 29-31.03. 1985. okazis la 7-a Renkontiĝo de Pacdefendantoj en Pardubice (Ĉeĥoslovakio).

La 29.03.1985. antaŭtagmeze akceptis la eksterlandajn delegitojn la urbestro. Poste la partoprenantoj vizitis Zámeček, kie ili metis florojn sur la tombon de la martiroj, kaj d-ro Jičinsky rememoris pri la martiroj. Posttagmeze la partoprenantoj grupe vizitis la fabrikon de muelilmaŝinoj TMS, en la entrepreno TVAR, kie laboras „Brigado de socialisma laboro de pacdefendantoj". En la vizititaj lokoj okazis tre abundaj opini-interŝanĝoj inter la partoprenantoj kaj la laboristoj. Vespere okazis riĉa kulturprogramo.

La 30.03.1985. okazis la solena inaŭguro, kiu komenciĝis per muziko de „Barbuloj", sekvis ĝin pioniroj kun versoj de Jiří *Kořínek* „Infanoj vokas". Festparolis la prezidanto de la Distrikta Packonsilantaro Jiří *Kovár* – kiu laŭ propraj spertoj parolis pri la militaj aferoj – poste alparolis d-ro Imre *Pethes,* prezidanto de MEM, kaj distingis per „Honorinsigno de MEM" Eva *Seemanová* kaj Karel *Franc.* Alparolis ankaŭ reprezentantoj de Aŭstrio, GDR, Bulgario, Hungario – kiu laŭtlegis la salutleteron de la Hungara Packonsilantaro –, Francio, Kanado kaj Sovetio. La dialogoj daŭris ĝis la 16a horo, kaj poste estis akceptita alvoko. Dum la antaŭvesperaj horoj kunvenis sekcioj: MEM, medicinista, fervojista, pedagogia, literatura, ŝaka kaj KEK. Vespere okazis amika kunveno kun antaŭdanco kaj riĉa tombolo.

La 31.03.1985. la partoprenantoj per kvar aŭtobusoj vizitis Ležáky – kie la ĉeestantoj aŭskultis la historion Ležáky, kaj salutis ilin en la nomo de la Distrikta Packonsilantaro k-do Bouška – poste ili vizitis subĉielan vilaĝmuzeon en Vysočina aŭ kastelon en Nové Hrady. Post la reveno okazis vizito al la malnova parto de la urbo, kaj en la Kulturdomo DK. Dukla – kie okazis la renkontiĝo – oni povis vidi ekspo-

★★★

la plej bona verko de la jaro estis asignita premio (ricevinta la nomon el la titolo de la fama SF-romano de Aleksej *Tolstoj*). Laŭreatoj de la pokalo farita el la uralaj juveloj estis Aleksandr *Kazancev,* fratoj Arkadij kaj Boris *Strugackij,* Zinovij *Jurjev,* Vladislav *Krapivin,* Sergej *Snegov.* La premiado pretekstas renkonton de SF-amatoroj el la tuta lando; ekz-e en 1983 al Sverdlovsk venis tiuj el 35 urboj, eĉ el tiom distancaj kiel Kiŝinjov, Irkutsk, Murmansk kaj Tbilisi. Ĉio ĉi plej salubre efikas al la reputacio de US, kies eldonkvanto jam superis 300 000 – absolute neimagebla afero por la periferiaj revuoj!

Verŝajne kaj US kun siaj publikaĵoj, kaj la premio „Aelita", kaj dank' al tio reviviĝinta agado de KLF (Kluboj de SF-amatoroj) stimulis ankaŭ la verkadon de la Uralaj scifiaj verkistoj?

Ekde 1980 ĉiujare tri Uralaj eldonejoj (Sverdlovsk, Ĉeljabinsk kaj Permo) eldonas la almanakon *Poisk* (Esploro) sur kies 300-400 paĝoj aperas la plej interesaj scifiaj kaj aventuraj verkoj, Eldonatas ankaŭ apartaj libroj en Sverdlovsk, la lasta el kiuj „Tigro akompanos vin al la garaĝo" de Sergej *Drugalj* vendiĝis dum unu horo, kelkaj, kiel Vladislav *Krapivin,* publikiĝas ankaŭ eksterlande. Nun en Sverdlovsk preparatas „Knabo el Savano" de Semjon *Slepynin* kaj „Kolombejo sur flava kampeto" de Vladislav *Krapivin.* Kaj mi mem estas inundita per manuskriptoj, jam pretas la plano por la proksimaj du jaroj – da laboro estas pli ol sufiĉe...

Nun la lasta demando: SF kaj Esperanto, aŭ pli vaste, SF kaj la problemo de la internacia lingvo, kia rilato estas inter ili, kaj kiel US koncernas ĝin?

La rilato estas sufiĉe forta, ja ne hazarde la fama Jules *Verne* iĝis en 1904 honora prezidanto de la E-klubo en Amiens. Unuflanke: Eo kiel artefarita kaj uzata de centmiloj lingvo – ĉu ne estas tio SF? Se rezoni serioze, en SF renkonteblas interlingvistikaj elementoj, ekz-e protagonistoj de la romano de A. *Beljajev* „Batalo en la etero" tutsimple uzas E-on, ankaŭ niaj Uralaj scifiaj aŭtoroj sporade fantazias pri la temo, kiel I. *Davydov* en sia „Mi revenos post 1000 jaroj", kiu, cetere, provokis viglan proteston de la sovetaj esperantistoj. En la konkurso de 1980 US proponis demandon pri IL en SF, kaj kelkaj legantoj sendis sufiĉe detalajn respondojn. En *Poisk-83* estas novelo de Leonid *Juzefoviĉ* „Klub Espero", kies temo estas mistera murdo de Petrograda kanzonistino en unu el la Uralaj E-kluboj en 1920-a jaro. Aliflanke: ne nur Eo en SF, sed ankaŭ SF en Eo. Mi eĉ ne sciis, ke en Eo aperas tia originala SF-literaturo kia „La fermita urbo" de István *Nemere,* kvankam mi jam pli frue sciis pri Konisi *Gaku.* Kaj Sferoj (Vitalij Bugrov foliumas la 1an kaj 2an volumojn) – *Lem, Clarke* – bor ege! *Borges* – nu, lin oni nur tute ĵuse ektradukis al la rusa... Bona afero, kaj Eo kaj la literaturo en ĝi. Estas ankaŭ la tria aspekto, kiu iel parencigas Eon kaj SF-on: Esperanto kaj SF-amatora movadoj – ili en multo similas.

Sed US traktas IL-on ne nur tra la scifia lupeo. Dum la 80-aj jaroj aperis en ĝi historiaj skizoj de Viktor *Kloĉkov* pri la milita skolto kaj esperantisto Nikolaj *Kuznecov* kaj pri la planlingvo „Omo" kaj ties aŭtoro Vladimir *Vengerov.* Verŝajne, tiaj materialoj aperos ankaŭ estonte. Mi ŝatus vidi artikolon pri SF kaj Eo, eble ni okazigos laŭteman literaturan konkurson. Eo kaj sciencfikcio kaj fantasto efektive havas multon komunan, kaj la kunlaboro estus tute natura; ni esperu, ke la verkistoj metos pli da atento al Eo kaj la esperantistoj al SF!

Dankon pro la intervjuo!

Aleksandr *Korfenkov*

zicion de kontraŭmilitaj desegnaĵoj de Pavel *Rak*, pri Hiroŝima-Nagasaki, kaj infanajn desegnaĵojn. La bone organizita renkontiĝo finiĝis vespere per amika interbabilado.

3-a Internacia Kanzon-teatra Festivalo

Unuiĝo Franca por Esperanto preparas la 3-an Internacian Festivalon por Kanzono kaj Teatro de Parizo. Ĝi okazos la 23-an kaj 24-an de novembro 1985 kaj entenos 5 spektaklojn.

Pasintan jaron oni prezentis teatrajn trupojn el Francio kaj Jugoslavio, kaj kantistojn el Belgio, Francio, Germanio, Italio, Pollando, kaj kabaredan francan trupon.

Por pli detalaj informoj aŭ partopreno, turnu vin al: U.F.E. (Internacia Festivalo), 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris.

Esperantistaj pantomimistoj

Novan artan grupon ni prezentas al la esperantistaro: la pantomiman trupon „Pingvino". La aktoroj de la trupo estas profesiuloj.

Dum la tutvesperaj prezentadoj ilia celo estas atingi ĝeneralan kompreneblecon. En etudoj ili prezentas la tradiciajn bazajn situaciojn de komikeco: tiaj etudoj en ilia programo estas „Vilhelmo Tell", „Drakula", „La dentkuracisto", „Teatro" kaj „Spegulo". En lirikaj programoj helpe de fotoj kaj danco ili aplikas ankaŭ la mildan erotikon.

Ili bone konas la internacian lingvon de la movoj, kaj jam lernas la parolatan internacian lingvon Esperanton, do ili konfesas sin esperantistoj kaj ofertas sian programon al la esperantistaro en la tuta Esperantujo.

Argentina Esperanto-Lernejo

Argentina Esperanto-Lernejo estas senprofitcela organizo por la instruado de Esperanto per korespondo en Argentino kaj Latinameriko.

Ni instruas per elementa kaj perfektiga kursoj kaj disponigas al la gelernantoj ekzemplerojn de diversaj revuoj internaciaj (kune kun ĉiu leciono), por ke ili praktiku kaj samtempe konatiĝu kun la Movado kaj integriĝu al ĝi.

Krome ni havas malgrandan Cirkulantan Bibliotekon, kiu pruntedonas librojn al la gelernantoj kaj eksgelernantoj, tial ke estas tre malfacile aĉeti librojn eksterlande pro la altega kosto danke al nia senhalta inflacio. Sed la lernantoj estas multaj kaj la libroj malmultaj.

Ni ĝoje ricevus Esperantajn librojn kaj revuojn, kiujn vi ne plu bezonas. Kontrolu: tute certe troviĝas sur viaj bretoj unu-du tiaj libroj kaj revuoj. La kontribuaĵojn bonvolu sendi al: **Argentina Esperanto Lernejo, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario, Argentino**

Enketo ĉe la junularo

Esplorgrupo pri socia psikologio dezirus ekscii, kiel hodiaŭaj junuloj (ĉirkaŭ 16-30 jaraj) de la mondo prezentas al si sian socion, kiel ili vidas la sociajn rilatojn.

Kompreneble ni pensas pri la esperanta movado, ĉar la esperantista junularo estas tutmonda; do ni povas atendi tre diversajn respondojn.

Samtempe la esperantistoj estas eble specifaj. Ĉu la respondantoj sentas ian specifecon?

En ĉiu medio kelkaj individuoj estas rimarkataj, distingataj. (Oni admiras iufoje, aliafoje oni timas, envias, kompatas aŭ malestimas aliulojn...)

Iuj distingas individuojn ĉie sammaniere. Aliaj observas malsame, dependе de tio, ĉu ili estas en sia laborloko, en sia familio, sportante aŭ babilante kun amikoj.

1.) Kiajn individuojn oni rimarkas?
2.) Kio en tiu-ĉi rimarko dependas de la medio?
3.) Ĉu (kaj se jes, kiel) la epoko influas la reagon de la homoj?
4.) Ĉu la junuloj sekvas la maljunulojn aŭ kondutas alie?
5.) Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas diferencaj?
6.) Ĉu ekzistas „esperantistaj" agmanieroj, aŭ ĉu la esperantistoj reagas, kiel aliaj anoj de la medio?

Ni ŝatus ricevi informon pri sekso, aĝo, profesio kaj loĝlando de la respondantoj.

Bonvolu sciigi ankaŭ: kiamaniere vi eksciis pri nia enketo.

Ni certigas diskretan uzon de la respondoj, kaj publikigos la rezultojn de tiu-ĉi enketo tie, kie vi legas nian demandaron. Ni esperas, ke viaj respondoj kondukos nin al pli precizaj demandoj.

Antaŭe dankon.

Bonvolu sendi viajn respondojn al **ACRE, 292, Bd des Bressons, F-13300 Salon de Provence (Francio)**

Sceno el la programo de la trupo „Pingvino"

Novaj elektronikaj instrumentoj

Datum-prilaboro kaj multaj industriaj taskoj bezonas diversajn, multspecajn mezurinstrumentojn kaj aparatojn elektronikajn por mezuri kaj ekzameni, same por reguligoj kaj direktadoj, kaj ankaŭ por kalkuladoj. Tiujn zorge disvolvas kaj fabrikas la prestiĝa hungara firmao, la *Fabriko de Elektronikaj Mezuraparatoj.*

La produktaĵojn de la fabriko eblas dividi je kvar karakterizaj grupoj. Tiuj estas, unue: la elektronikaj mezurinstrumentoj kaj mezursistemoj; due: la teknologiaj mezuraparatoj por la elektronika industrio; trie: la organiz-teknikaj aparatoj; kaj kvare: la reguligoj por ilmaŝinoj.

En la *unua grupo* troveblas la kutimaj elektronikaj mezurinstrumentoj: sinus-generiloj, impulso- kaj funkcio-generiloj, osciloskopoj, mezuriloj de moduladoj, de distordoj, multkanalaj analiziloj. Estas aparte menciinda el inter tiuj la *programebla, kristalregata funkcio-generilo de tipo 12574,* kiu estas sinteze frekvenca fonto de sinusa, triangula kaj kvarangula, segila kaj impulsa signaloj. Pere de precizega, deekstera horloĝ-signalo la precizecon eblas ankoraŭ pliigi. La frekvenco-intervalo troviĝas inter 0,001 Hz kaj 10 MHz.

Pere de la *programebla funkcio-generilo de tipo 12567* produkteblas funkcio-generilaj bazsignaloj (sinusa, triangula kaj kvarangula, impulsa kaj segila) ene de la frekvenco-intervalo inter 0,01 Hz kaj 10 MHz. La konekteblaj ekigaj funkciomanieroj (TRIG, GATE, BURST, PLL x N, PLL ÷ N), krome la modulaj funkciomanieroj (AM, FM, LIN/LOG, SWEEP, VCO) prezentas tre grandan liberecon por formi la bezonatajn signalformojn. En la funkciomaniero INT X-TAL REF la frekvencon eblas ĝustigi kristalprecize. En la funkciomaniero ARBITRARY eblas fiksi kian ajn signalformon kaj ĝin stori sur magnetbendo kaj laŭdezire reaperigi, ankaŭ la tutan signalon aŭ ties laŭplaĉe elektitan parton ree vidigi. La enkonstruita IEC 625 kaj RS 232C interfacoj ebligas ĉiurilatan teleregadon pri ĉiuj funkciomanieroj de la aparato.

La *altfrekvenca osciloskopo de tipo 1556* taŭgas por ĝenerala uzado. Ĝi estas vere grandkapabla aparato, laboratorie precizega. Eblas alkonekti du vertikalajn kaj unu horizontalan devojigajn unuojn. Helpe de du-kanalaj, elektronŝaltilaj kaj larĝbendaj du preamplifiloj (de tipo 15565) kaj unu duobla tempo-devojiga unuo (de tipo 15566) ĝi estas – samtempe per kvar kanaloj – eminente utiligebla por ekzameni kaj mezuri la elektrajn fenomenojn okazantajn en la frekvenco-intervalo inter 0 kaj 250 MHz.

La *registra aparato de tipo 79815* estas inteligenta, mikroprocesora instrumento. Kiel grafika periferio de komputiloj, programeblaj kalkuliloj, elektronikaj mezursistemoj, ĝi taŭgas kun surskriboj registri figurojn – ĉu konstruitajn, ĉu kalkulitajn –, mezurindikojn kaj funkciojn. Sur A/3 paperformato la surfaco de la desegnado estas

Encirkvita testilo (tipo 19400)





Programebla, kristalregata funkcio-generilo (tipo 12574)

ĝustigebla, la karaktroj estas programeblaj laŭ dimensio kaj grafika bildo. Kapabla desegni du-kolore, la aparato mem ŝanĝas tiucele plumojn. La manipuladon multe helpas altnivelaj instrukcioj por parametrojn ĝustigi kaj desegni. Ĝi havas enigan bufo-storon kun kapacito de 2 Kbajtoj. La distingivo de la aparato estas 0,1 mm, la morta-zono ± 0,2 mm. La interfacoj: IEC 625, RS 232C kaj Parallel kontribuas al la konektado de sistemoj.

La *multkanala analizilo de tipo 38000* servas unuavice kiel mezurilo por la nuklea fiziko, precipe por akcepti kaj prilabori gama-spektrojn. Krom tiu ĝi bone taŭgas ĉe tiuj mezuradoj, kiam oni devas rapidege kolekti kaj prilabori multegajn datumojn, ekz. ĉe neŭtron-spektroskopio, rentgen-spektroskopio, biofiziko, kaj en pluraj sferoj de la maŝinfaka mezurtekniko. La aparato havas 8192-kanalan storon por la datumaro, kaj ebligas kvarkanalan impuls-amplitudan analizon, respektive ok-kanalan plurtaskan funkcimanieron. La datumprilabora procezilo, havanta ROM kaj RAM storojn (64 Kbajtoj), estas programebla por analizilo-specifaj instrukcioj, helpe de pliampleksigita BASIC-lingvo.

La *duan grupon* konsistigas la teknologiaj mezuraparatoj de la elektronika industrio, al kiuj apartenas inter aliaj: instrumentoj por ekzameni duonkonduktilojn, karakteristik-vidigiloj duonkonduktilaj, signal-analizoj kaj mezursistemoj.

La *ekzamenilo de linearaj integritaj cirkvitoj (tipo 19680)* mezuras rapidege, multflanke kaj aŭtomate, krome klasifikas kaj selektas. La aparato kapablas mezuri tre multajn specojn de linearaj integritaj cirkvitoj, sekve la plej multaj ekzamenoj de la praktiko estas plenumeblaj per ĝi. La testprogramon oni tre facile enskribas interaktive per la enkonstruita klavaro, kaj aldone, la aparato posedas multajn antaŭpreparitajn testprogramojn. La mezurindikoj aperas sur bone legebla vidigilo, kaj pere de la enkonstruitaj interfac-cirkvitoj ili estas dokumenteblaj fare de eksteraj serviloj. Okaze de serio-ekzameno eblas alligi ankaŭ dozigilon. La aparato fine dividas la ekzamenitajn cirkvitojn laŭ kvin klasoj de kvalito.

La *ekzamenilo de tipo 19700* por la diĝitaj integritaj cirkvitoj LSI kaj VLSI, kapablas ekzameni maksimume 64-piedajn diĝitajn integritajn cirkvitojn, kontroli la DC parametrojn kaj la funkciadon kun testrapido de 5 MHz en mezurtempo dividita je 500 ps. Por la uzanto, ATLSI programlingvo – altnivele mezurorientita – en disk-operacia sistemo (DOS) faciligas la simplan programfaradon, ankaŭ la manipuladon de taŭgaj testoj memkontrolaj kaj memkonfirmaj. Ĉe ekzamenado de LSI memorioj, mikroprogramita procezilo produktas la internacie aplikatajn signalformojn. Eblas mezuri RAM 128 K x 8 bitojn, ROM, PROG, EPROM, EAROM 64 K x 8 bitojn. La flekseblan kontroladon de katalogizitaj LSI cirkvitoj, mikroprocezilojn, periferiaj ĉipoj kaj de la iloj de la uzantoj bone ebligas la speciala procezilo. La ekzamenilo per normaj interfaco kaj programoj adaptebla s al la sistemoj CAD, CAT, CADMAT. La aparato cetere estas utiligebla por ekzameni cirkvitojn enujigitajn helpe de aŭtomata dozigilo. Eblas ankaŭ segmente mezuri pere de segmentmezurilo. Ĉiuj ĉi estas bone aplikeblaj kaj ĉe fabrikantoj de la integritaj cirkvitoj dum seria ekzamenado, kaj ĉe uzantoj, dum kontrolado de la ricevitaj cirkvitoj.

Diĝit-stora karakteristiko-vidigilo kaj -analizilo (tipo 1577)



Inter la plura j vidigiloj de karakteristikoj estas menciinda la *diĝit-stora karakteristiko-vidigilo kaj -analizilo de tipo 1577.* La novmaniere konstruita instrumento transformas diĝite la analogajn signalojn (kurentojn, tensiojn). Tio ebligas stori ilin ĝis kiam ajn, krome per grupigo de la datumoj diversmaniere prezenti ilin (ekzemple vidigi plurajn karakteristikojn en aparta aŭ sama koordinato-sistemo kune aŭ sinsekve). Sur la ekrano samtempe estas figureblaj — maksimume — 16 grafikaĵoj. La aparato posedas elektronikajn toler-intervalo-generatoron kaj perturbo-senigilon de la elektra reto. Pere de la baza mezurunuo eblas efektivigi mezurojn ĝis 1600 V, respektive 16 A, kaj pere de la alttensia mezurunuo eĉ ĝis 1000 A. La eniraj-eliraj-transferaj karakteristikoj de la duonkonduktiloj estas same duonkonduktiloj.

Mikro- kaj mini-proceziloj, kombinitaj kaj sekvencaj retoj, rel-sistemoj estas ekzameneblaj per la logika mikroprocezila stato-analizatoro. Helpe de ĝi eblas sekvi la funkciadon de la sistemoj, kaj la eraroj kaj misaĵoj en la aparatoj kaj programoj estas facile serĉeblaj kaj elimineblaj. La aparato memorigas la deziratan etapon de la enira impulsaro, kaj sur la enkonstruita ekrano vidigas ĝin en mnemonika formo, respektive kiel tempodiagramon. Por la plej popularaj mikroproceziloj eblas akiri tute specialajn enir-unuojn (8080, 8085, Z-80, 8086).

La *mezuraŭtomato de tipo 19400,* regata de encirkvita testilo komputilo, taŭgas por kontroli la muntitajn-presitajn cirkvit-kartojn. La aparato povas ekzameni encirkvite kaj certagrade pri la funkciado, trovi blokitan aŭ rompitan cirkviton, mankantan, eraran aŭ malĝuste enigitan eron, kontroli funkcikapablon de l' integritaj cirkvitoj. La ricevitaj rezultoj estas preskaŭ sendependaj de aliaj eroj de la cirkvito: gardo-cirkvitoj, respektive impulso-mezurado ebligas la sendependigon. Maksimume 1024 analogaj, aŭ 960 diĝitaj, respektive 480 hibridaj + 32 analogaj punktoj mezureblas, depende de la alkonstruado. La mezuradon oni faras pere de najlo en pneŭmatika ĉuko (tenilo). La aparato aŭtomate produktas la testprogramojn, kaj per memkontrolaj programoj ekzamenas sian propran funkciadon. Uzante tiun aparaton oni povas grave malpliigi la daŭron de la mezurado kaj riparado de la muntitaj-presitaj cirkvit-kartoj, do la permanan laboron kaj ties kostojn.

La *programebla grafika komputilo de tipo 777* taŭgas por sciencaj-teknikaj kalkuladoj, regado de mezursistemoj, mezgranda datum-prilaboro kaj — helpe de grafika kompletigo — por ties grafikaj taskoj du-dimensie, ankaŭ figuri funkciojn. La aparato enhavas bitsegmentitan mikroprogramitan ĉefprocezilon (AM 2901) kaj tri periferiajn procezilojn (INTEL 8085). La enkonstruitaj periferioj estas alfanumera-grafika vidigilo de 31 cm diametro kaj du mezursistemo-interfacoj. La tajpil-klavaro konektiĝas per aparta kablo, same la alfanumera-grafika larĝpresilo. La programlingvo estas la ampleksigita BASIC. La ĉefaj direktoj de la ampleksigo estas la rikord-manipulado, instrukcioj por plifacile regi la mezursistemon, grafikaj instrukcioj, matric-manipulado, ĉeno-manipulado kaj ampleksigitaj stokoj de funkcioj kaj instrukcioj.

La Centra Esplorinstituto pri Fiziko (KFKI) disvolvis la *universalan, mikroprocezilan, disvolvan sistemon (UMDS) de tipo 72202.* Ĝi servas por integrita disvolvo kaj baza mezurado de aparatoj bazitaj sur mikroproceziloj. Helpe de ĝi plifaciliĝas kaj rapidiĝas la projektado, prilaboro kaj kontrolado kaj de la programoj, kaj de la aparataro.

La mikroprocesoraj regadoj HUNOR estas taŭgaj por regi kontinu-kurentan, respektive asinkron-servomotorajn ilmaŝinojn. Depende de la tipo, la 2-5 aksaj, 0,01—0,001 mm-an precizecon certiganta regado estas permane, klavare facile programebla. La tutan regadon multe faciligas apartaj, al la diversaj ilmaŝinoj adaptitaj regadoj (tornilo, frezilo, akrigilo, randofleksilo, nana prilabora instalaĵo ktp.), enkonstruitaj maŝin-orientitaj fiks-cikloj kaj geometriaj kalkuladoj. La servoj de la precize preparita regado bone adaptiĝas al la teknologiaj bezonoj de la ilmaŝinoj. La enkonstruita alfanumera prezentilo, la alkonektebla ekrano CRT, la programoj, ricevataj de trubendo, magnetofono aŭ programpreparilo, eminente servas la flekseblecon de la regado.

UMDS universala, mikroprocezila disvolva sistemo (tipo 72202)

Produktas:

ELEKTRONIKUS
MÉRŐKÉSZÜLÉKEK GYÁRA
H-1163, Budapeŝto XVI. Cziráky u.26.
Telefono: (1) 837-950
Telekso: 22-4535

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

Rigardoj en nian tempon

Dilemoj de la nuntempo – vide el Hungario. Socio–ekonomio–komunikado. Ses studoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 21 cm. 101 p. Prezo: 12,- ned. gld.

„La plej oftaj vortoj, kiujn vi trovos en la sekvaj studaĵoj, estas la kunagado kaj la *informado*. Ne estas nura humana sento, tradicia valoro aŭ politika prefero, sed elementa scienca fakto, ke sen la aero spirata de Helsinki kaj ekster la kadroj de la 'strategio de kunagado' ni ne povus vivi plu." Jen vortoj el la redaktora programdeklaro al „Dilemoj de la nuntempo – vide el Hungario". Temas pri kolekto de ses artikoloj el la plumo de hungaraj scienculoj pri la plej urĝaj problemoj de la mondo.

Loĝantara trokresko, nutraĵmanko, energikrizo, elĉerpiĝo de krudmaterialoj, poluciado k.a. ĉiam pli maltrankviligas, foje ŝokas nin. La senlaboreco atingis netolereblajn proporciojn en multaj landoj, pri kio oni ofte emas kulpigi la pli kaj pli vastan aplikadon de komputiloj sur ĉiuj kampoj. Kaj la plej akuta malsano nuntempa de longe estas la vetarmado kaj la minaco de nuklea pereo.

La pliakriĝo de la tutglobaj plagoj kaj sekve nesekureco antaŭ la estonteco naskis novan sciencobranĉon, futuresploradon. Ja ĉiam la homo scivolis pri sia estonteco. Novas tamen, ke la futuresplorado ne estas sekvo de pura scivolemo. Ĝi rezultas el praktikaj kialoj, resumeblaj kiel ŝtorma ritmo de sociaj ŝanĝiĝoj kaj kiel konstante plifirmiĝanta kunligo inter enlandaj kaj eksteraj procezoj. La futuresplorado konkretiĝas en t.n. mondmodeloj, esplorantaj alternativajn evoluvojojn kaj ties sekvojn, ĝenerale kun la tempospino ĝis 2000–2100 aŭ eĉ pli foraj jaroj.

La unua mondmodelo, „La limoj de la kresko", fare de la Roma Klubo, aperis en 1972. Poste sekvis jam pluraj aliaj. D-ro G. Kovács analizas ilin en tre interesa studo kaj montras multajn malfortajn erojn en ili, cele al la ellaboro de hungara modelo. En neniu socialisma lando oni preparis tian modelon ĝis nun. En kio povus diferenci modelo farita en la „dua mondo" disde tiuj de la altevoluinta „unua mondo", jen la objekto de tiu ĉi artikolo.

Ĉiuj modelfarantoj samopinias pri grava afero: nepra antaŭkondiĉo por sukcese solvi la gigantan problemaron estas paco kaj kunlaboro. Tion destinas la tutmonda karaktero de la problemoj. Streĉe pensinstiga, eĉ rava enkonduko en la demandojn de kunagado estas la unua kaj plej longa artikolo de la volumo, „Sociaj insidoj" de E. Hankiss. Pri socia insido temas, kiam por solvi iun problemon oni aplikas rimedon, kiu finfine nenion solvas, malfaciligas aŭ eĉ baras la solvon. La plej grandskala socia insido estas la vetarmado, sed la leganto facile rimarkas insidajn situaciojn eĉ en sia ĉiutaga vivo, dank' al la trafaj ekzemploj de la aŭtoro. Hankiss montras, ke la insidoj povas esti supervenkitaj per kunagado. Li malkovras, kiel oni povas realigi la kunagadon, sed ankaŭ pri tio li atentigas, ke la kunagado ne estu altrudita kiel panaceo, ĉar en iuj kazoj aliaj strategioj estas preferindaj, ĉar pli efikaj. La leganto tuj ekpensas pri certaj principoj de la ekonomiaj reformoj en Hungario!

Se la artikolo de Hankiss prezentas ĝenerale validajn teoriaĵojn, tiu de akademiano J. Bognár kvazaŭ rekte aplikas ilin al la monda ekonomio. El la vidpunkto de la atingo de ekonomia sekureco li ekzamenas la interrilaton politiko–ekonomio, precipe kiel „senpolitikigi" la internaciajn ekonomiajn kontaktojn. Ja ni jam tro spertis, ke „la politikaj konfliktoj etendiĝantaj al la ekonomiaj kampoj minacas ne nur la ekonomian sekurecon, sed ankaŭ la ekonomian evoluon kaj la solvojn de tiuj fundamentaj problemoj, kiuj postulas kontinuan kaj senĝenan kunlaboron."

Informado havas esencan rolon en la kunagado, montras Hankiss. Du artikoloj estas dediĉitaj ĝuste al tiu ĉi temo. T. Szecskő skribas, ke Hungario ankoraŭ ne povas esti konsiderata kiel informisma socio kaj iom polemike li malkaŝas simptomojn pri tio. Li nepre pravas substrekante la gravecon de informado por favora socia atmosfero, dank' al kiu la civitanoj pli trankvile eltenas ekz. antaŭvideblajn ekonomiajn ŝarĝojn. Akademiano T. Vámos dispafas kelkajn mitojn, ligitajn kun la venkomarŝo de la komputilo, ekz. tiun pri senlaboreco. Li revuas tiujn novajn eblojn kaj postulojn, kiujn elmetas la disvastiĝo de la komputiloj. Nur pretere estas menciita la pretiĝo de leĝo pri informado en Hungario. Similaj leĝprojektoj estas arde diskutataj en multaj landoj, tute aparte la problemo, kiel protekti la „privatecon".

P. Józsa pristudas la estetikan praktikon de diversaj popoltavoloj, ĉefe tiun de la laboristoj. Li konstatas, ke la socia posedo de la „alta arto" daŭre restas monopolo de la intelektuaro, dum en la estetika praktiko de la neintelektulaj tavoloj temas nur pri serĉado de malkonektiĝo disde la ĉiutagaj zorgoj. Li rekonas, ke la sintenon de la lastaj determinas tradicioj de la pensmaniero, nur malrapide ŝanĝeblaj. Sed tiu determino estas nur parta kaj laŭ Józsa eblus ŝanĝi la estetikan praktikon, se jam ekde la elementa lernejo oni inicus la lernantojn pri estetikaj kodoj, t.e. pri la lingvo de la artoj. Tiel oni lernus, *kiel* legi romanon aŭ poemon, rigardi filmon aŭ bildon ktp. Oni ekkomprenus, ke „la dana reĝido Hamleto ne estas simple la dana reĝido Hamleto."

Per tiu ĉi volumo la sociscienca literaturo de esperanto grave pliriĉiĝis. Mi tre esperas, ke la kromtitolo „Socio–Ekonomio–Komunikado" ne aludas nur la enhavon de tiu ĉi artikolaro, sed libroserion kun pliaj titoloj. Kvankam la verko estas strikte scienca, temas pri sciencpopularigo kaj ĝin kapablas legi ĉiu, kiu interesiĝas pri sia tempo. Kaj se tamen vi ne tuj komprenas iun eron, legu plu kaj jam vi kaptos la ideon!

Ankaŭ lingve la volumo estas tre bone prizorgita, kio aparte gravas ĉe verko kia tiu ĉi. Nur pri la termino „sciumo" mi grumbletas. Mi preferas la simplan „scipovo", kiu klare redonas la du aspektojn de la nocio „know-how", t.e. scii kaj povi.

Osmo *Buller*

Historio el la ĉina mitologio

Senmortigaj Fruktoj. Bildrakonto. Teksto kaj bildoj de Mej Jing. Eldonis:

Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 68 p. 18x20 cm. Prezo por Hungario: 80,- forintoj.

Tiu ĉi mitologia historio – destinita ne por infanoj, sed por plenkreskuloj – estas ĉerpita el la fama mitologia romano „Pilgrimado al la Okcidento", verkita de U Ĉeng'en en la 16-a jarcento. Tiu ĉi bildrakonto estas adaptaĵo de kolora filmo kun la sama titolo.

La historio de „Senmortigaj Fruktoj" okazas antaŭ ĉ. 1300 jaroj, dum la regado de la Tang-dinastio. La etoso de la rakonto estas tre propra: ŝveba mistikeco kombiniĝas en ĝi kun la plej palpebla realeco. Ĝi ne havas iun frapan finon, ĝia valoro baziĝas ĝuste sur la – por Eŭropanoj tre ekzotika – etoso.

Tiu ĉi libro plaĉos unuavice al tiuj legantoj, kiuj interesiĝas pri medioj, pensmaniero kaj atmosfero plene diferenca disde la Eŭropa. Tiujn treege trafe bildigas la desegnaĵoj kun sia impresa kolordinamiko, helpante percepti ankaŭ la specifecon de la rakonto.

Tre bela teknika aspekto kaj senriproĉa lingvaĵo faras tiun ĉi libron havinda por ĉiuj, kiuj deziras ekkoni per Esperanto ion tre karakterizan el la klasika ĉina kulturo.

Por infanoj kaj komencantoj

Serĉi Panjon. Bildlibreto. Adaptita de Han Xing. Pentrita de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 17x18 cm. 26 p. Prezo por Hungario: 32,- forintoj.

La simpla historieto rakontas pri tio, kiel kokino elkovas kune kun siaj propraj ovoj ankaŭ tri anserovojn. La elkoviĝintaj kokidoj kaj anseridoj mire konstatas, ke ili diferencas unu de la alia. Tiam la kokino klarigas al la anseridoj, ke ilia patrino estas anserino. La etaj anseridoj iras por serĉi sian patrinon, kaj post iom da serĉado ili trovas ŝin. La patrino instruas ilin naĝi, kaj ankaŭ la kokidoj kaj la kokino venas por vidi tion. La kokidoj bedaŭre konstatas, ke ili ne kapablas naĝi, ĉar ili ne havas haŭton inter la piedfingroj. Tamen, ili baldaŭ povas ĝoji, ĉar la ansero prenas ilin sur la dorson, kaj „ŝipveturigas" ilin.

La mallongan kaj tre facile kompreneblan tekston sur ĉiu paĝo akompanas bela kolora bildo. Libreto tre bone utiligeblas ankaŭ jam en kursoj por komencantoj.

Dek tri kandidatoj – por du murdoj

Deck Dorval: Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton. Detektivromano, verkita originale en Esperanto. Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1983. 190 p. 21 cm. Prezo por Hungario: 250,- forintoj.

Eleganta jaĥto veturas sur la Mediteraneo kun gastoj el la altaj klasoj, krome doktoro Gulopez kaj inspektoro Kant (tamen ne Imanuel, sed Ksavero). La posedanto de la jaĥto, kiu invitis la societon, estas sinjoro Makston, ekstravaganca riĉulo. Neniu komprenas la veran celon de la invito, sed pro tiu aŭ alia kialo neniu rifuzas kunveturi.

La vojaĝo komenciĝas agrable, nur doktoro Gulopez kaj inspektoro Kant sentas sin iom fremde, ja ili ne apartenas al la „alta societo". Sed la sennuban bonfarton baldaŭ disvaporigas ŝoko: el la kajuto de Makston aŭdiĝas revolverpafo, kaj la timigite alkurantaj pasaĝeroj trovas lin morta...

Per tio la ĉeesto de inspektoro Kant sur la jaĥto ekhavas motivon: la Antverpena detektivo tuj ekagas, kaj li ne postrestas al la belga detektivo de la Agatha Christie-romanoj, al Poirot, Doktoro Gulopez, kiu jam antaŭ la murdo amikiĝis kun Kant, fariĝas iaspeca „doktoro Watson" apud la inspektoro.

La kazo ŝajnas simpla. En la mano de la murdito oni trovas butonon, deŝiritan de sur la jako de komponisto Dubois, unu el la pasaĝeroj. La suspekto kompreneble tuj direktiĝas al li, tiom pli, ke evidentiĝis: Makston kaj li konis unu la alian delonge, kaj la rilato inter ili tute ne estis sennuba. Dubois firme neas, sed tiu neado ne multe tuŝas la inspektoron, ja neniu murdinto volonte konfesas sian krimfaron...

Sed baldaŭ la „simpla" kazo komencas komplikiĝi, nome, Dubois mortas. Klariĝas, ke iu venenis la pulvorojn, kiujn kutime li uzis kontraŭ kapdoloro. Do, eĉ se Makston estis murdita fare de Dubois, sur la jaĥto troviĝas alia murdinto, kiu metis strikninon en la pulvorojn. Kiu li estas? Sur la jaĥto ja veturas dek tri pasaĝeroj, pli-malpli egale kulpigeblaj...

Estus malĝentile nomi lin, mi nur volas certigi la leganton, ke la mistero estas plene solvita, kaj la solvo estas vere tre surpriza.

La aŭtoro tre zorge konstruis sian verkon laŭ la skemo de la klasika detektiva romano: li ebligas al la leganto provi sian logikkapablon. La lingvaĵo fluas nature kaj elegante – do mi senrezerve rekomendas ĝin al ĉiu ŝatanto de bonaj detektivaj historioj.

V. *Benczik*

La mondo en kvin minilibroj

Tibor Sekelj estas unika fenomeno en nia Movado: li estas tiu homo, kiu eble plej multe el ni ĉiuj realigis la esperantistan revon – koni la tuton de la mondo. Li tramigris kontinentojn, grimpis montopintojn, mergiĝis en la ĉiutagoj de foraj kulturoj, akre diferencantaj disde la nia.

Nun la Esperanto-Societo de Subotica eldonis kvin minilibrojn sub la titolo „La mondo de Tibor Sekelj". Ĉiu libro prezentas unu kontinenton: persontone agorditan enkondukan tekston sekvas po ĉ. 50 lignogravuraĵoj de Károly Andruskó, prezentantaj artisme la ĉefajn vidindaĵojn kaj karakterizaĵojn de la pritraktata kontinento. Per tiuj ĉi kvin libretoj kvazaŭ vizitas nin la mondo en nia legoĉambro.

La dimensioj de la tre bele faritaj libretoj estas 5x4 cm. Prezo de la kompleto por Hungario estas 350,- forintoj.

V. *Benczik*

Recenzistoj serĉataj

Ni serĉas kunlaborantojn, kiuj de tempo al tempo konsentos verki recenzojn laŭ la kutima amplekso de nia revuo. Volontuloj estas petataj verki specimenan recenzon pri iu ajn Esperanta libro, aperinta dum la lastaj jaroj, kaj sendi ĝin al la adreso de la Redakcio. Al la aŭtoroj de sukcesaj specimenaj recenzoj ni klarigos letere la detalajn postulojn por la regula kunlaborado.



GAJA PAĜO



Ne renta rendevuo

– Joĉjo! Vespere la gepatroj foriros, neniu alia estos en mia hejmo. Do vi povos veni al mi, karulo. Mi loĝas sur la *unua etaĝo.*

– Ho, karulino! Finfine! Sed diru: ĉu lifto estas?

– Ne.

– Tiam mi rezignas.

Post sukcesa rendevuo

La knabino demandas la junulon:

– Karulo! Ĉu vi konsideris jam pri la geedziĝo?

– Nu, kompreneble. Se mi ne estus konsiderinta tion, mi jam delonge estus edzo...

Ĉu telefoni poste?

Edzoj interparolas pri intimaj aferoj. Unuulo demandas la aliulon:

– Post ama kunesto ĉu vi longe konversacias kun via edzino?

– Jes, kondiĉe ke troviĝas telefono en la proksimeco.

Ĉu riproĉi poste?

Edzinoj interparolas pri intimaj aferoj. Unuulino demandas aliulinon:

– Kara Sara, nia edzina vivo estas plena da oferoj, ĉu vi konsentas?

– Tutege! Sed kiam mi estos maljuna, mi ĉiutage al li centfoje riproĉos, kiel mi oferis mian junecon por li!

Reciproka kritiko!

– Mia edzino naskos infaneton, sed ni jam kverelas pro ĝi.

– Kvereli? Kial, amiko?

– Ambaŭflanke ni esperas, ke ĝi ne similos al la alia gepatro!

Ruza kasisto

Antaŭ la bankkaso ekstaras viro kaj minacas la kasiston per pistolo. Estas nenia dubo pri lia celo, kion akcentas la nigra vualo sur lia kapo.

La kasisto brue ekridas, lian korpon konvulsie skuas ridego.

– La monon! Ĉion! – urĝas lin la rabisto.

– Ha-ha-ha, ho-ho-ho – ridegas nehaltigeble la kasisto – se vi vidus vian propran kapon en tiu ŝtrumpo, vi ankaŭ ridegus.

Ni lasu jam la virinojn!

– Kelnero, tiu bifsteko estas ege varma!

– Tiam bonvolu blovi sur ĝin, sinjoro.

– Mi provis jam, sed ĝi tuj forflugis!

Pardonu, nur knabino!

– Marinjo, hodiaŭ vi denove malfruis en la lernejo!

– Nu, okazis nenio grava, ĉu ne? Mia panjo daŭre ripetas, ke lerni estas neniam malfrue!

Malbonkonduta edzo

Do temas pri viro! Kvankam amikinoj interparolas:

– Estas terure, Rozinjo, kiel mia edzo malobservas la etiketon. Ankaŭ hieraŭ ĉe la vespermanĝo li trifoje oscedis, eĉ ne kaŝis sian buŝon...

– Sed kara Elinjo, eble ankaŭ li volis ion diri, ĉu?

Saĝa studento

– Strange! Kiom multe da baboj, babiloj kaj babilaĉoj vi prezentas tie ĉi! – koleras profesoro dum ekzameno. – Vi fuzas–konfuzas ĉion!

– Mi pensis, ke tiel saĝa persono, kiel la sinjoro profesoro, sukcese eltiros la esencon de miaj respondoj...

Blua sonĝo

– Diru, karulino, ĉu vi dezirus veturi per bela, granda, blua veturilo, kondukata de elegantan uniformon portanta ŝoforo?

– Kompreneble, jes, mia kara! Kiel grandioze estus!

– Nu, tiam rapidigu viajn paŝojn, korulino! Ke ni atingu la aŭtobuson ĝustatempe!

Lavado

– Edzineto, ĉu vi perdis la menson? Vi volas aĉeti lavmaŝinon, kvankam via panjo estas ankoraŭ fortika! ?

Glavado

– Montru al mi serion da kudriloj – diris viro en magazeno.

– Jes, bonvolu! Ĉu vi volas kudri, sinjoro? – demandis la vendistino.

– Tute ne. En la cirko glavon mi profundigas en mian gorĝon, sed nun la kuracisto ordonis al mi dieton.

Ervin *Fenyvesi*

Korespondi deziras

Mütze Karla (18) studentino, ktm, interesas vivo de indianoj, filmoj. *Pirna* Bergstr. 12. DDR-8300. – Hristo *Tonev* kursgvidanto, pri E-aj k.a. *Ŝumen,* P. Volov 12, BG-9700. – F-ino Katarzyna *Kulawiak* (19) pĉt. *Zory,* Os. Powstańców Sl. 12E3, PL-44-240. – Inĝ. Jacek *Lisowski* (26) pri kulturo, religio, moralo, sociaj problemoj, vivmaniero de popoloj, interŝ. E-revuojn. *Jaslo,* ul. Za Bursa 10. PL-38-200. – *Gudilin* Sergej (30) laboristo ktm, pri moderna muziko, fotografio. *Bratsk,* Box 2161, SU-665.728. – F-ino Zdravka *Dobreva* (40) oficistino, kol. kalendaretoj, bk, havi amikojn. *Sofio,* Zona B5, bl.10. B/II.85. BG-1303. – Dinko *Matev* (29) kuracisto, pĉt. *Obruĉiŝte,* ditr. Stara Zagora, BG-6294. – Janka I. *Ĵelezarova* (37) apotekistino, kun foraj landoj, pĉt. *Gálábovo,* bl.9.B-27. BG-6280. – Aleksandro *Fjodorov,* sperta E-isto pri tradukarto, literatura evoluo, verkado, stilistiko, interŝ. E-tradukojn, verkojn. *Sevastopolj,* ab.k.59. SU-335029. – S-ro *Gál* Antal (24) ŝatas legi, foti, muzikon. Kun similaj junuloj el tm. *Gyor,* Mészáros Lőrinc u.10. H-9023. – S-ro Marian *Kletkiewicz* (26) komencanto, pĉt. *Bobrowniki n.W.* PL-87-617. – S-ino Ivanka B. *Todorova Ruse,* str. Pristaniŝtna 11. BG-7012. – S-ino Dorinka St. *Dimova* (23) instruistino, pĉt. *Ruse,* str. Percevic 14. BG-7012.

Inĝ.-ekon. Czeslaw *Jasionowski* (39) kaj edzino, filoj (9,11) kun hungara familio, pri vojaĝoj, aŭtoturismo. Rec. gastado eblas. *Varsovio,* str. Polinezyjska 7/77. PL-02-777. – S-ro *Fomin* Jurij kun korespondamikoj, interŝ. pm, bk, diskoj, certe resp. *Barnaul* ab.ja. 911, SU-656.050. – *Osokin* Sergej (32) fraŭlo pĉt. ankaŭ rec. vizitoj. *Riga,* str. Kr. Barona 10-10. Latvio, SU-226011. – Ĵeko Kostov *Mitkov* (23) teknikisto, pĉt. *Gálábovo,* str. Ĉaja 10. BG-6280. – S-ino Ivanka Dim. *Todorova* (43) flegistino, pĉt. *Gálábovo,* B.10/B-58. – Mariusz *Máckowski* (18) fraŭlo, pri muziko, pm, pk. velado. *Świecie n.W.* str. IAWP 77m50. PL-86-100. – S-ino Ivanka P. *Todorova,* pĉt, ktm. *Ruse,* ul. Ĉiprovi 5, et.14/5. BG-7001. – Violeta N. *Velikova,* flegistino, ktm, pĉt, *Ruse/Tetovo,* str. Hr. Smirnenski 7. BG-7001. – Stanka I. *Ĵeleva* (33) telefonteknikistino, pĉt. *Gálábovo,* Bl.39/A, ap.4. BG-6280. – F-ino Oksana *Sanfara* (18) kun s-anoj 16-18 j. Kŭl. bk, diskoj, interesas turismo, muziko, *Kirovograd,* str. Volkov 25-68. Ukrainio, SU-316.028. – Katja Dr. *Pejkova,* pĉt, ktm. *Ruse,* str. Pliske, bl. Pâarva prolet 8. II. BG-7002. – Rosica D. *Atanasova,* ktm, *Ruse* DZS, BG-7011. – F-ino *Doburzynska* Jolanta (25) studentino, kun hobioj muziko, turismo, modo, fotoarto, sporto. *Walcz,* ul. Chopina 10/4. PL-78-600. – Bonĉo Ĵ. *Kondov* (38) pentristo, pĉt. *Gálábovo,* kv. Mitjo Stanev BG-6280. – S-ino Ivanka P. *Todorova* (34) pianistino, pĉt. *Gálábovo,* Bl. 21. et. 11-52. BG-6280. – Grupo de anglaj gelernantoj (ĉ. 12 j.) de Eo volas interŝ. leterojn, pm, bk, kun hungara lerneja grupo. S-ro R.E. *Rocketts,* Southlands School, *New Romney,* KENT TN28 8BB, Anglio.

Leterkesto

Miĥajlenko, N.N., *Moskvo,* SU: Pri la lastatempe en kelkaj gazetoj menciita „internacia lingvo" *Romanid* estas facile doni informojn. Verdire ni hungaroj scias pri tiu projekto jam depost du jardekoj, kaj intertempe nenio ŝanĝiĝis. Tio signifas, ke la projekto de d-ro *Magyar* Zoltán dum la jardekoj atingis nenian rezulton, kaj nenie havas adeptojn. D-ro Magyar nuntempe parolis kelkfoje al ĵurnalistoj, kaj laŭ tio disflugis kelkaj artikoloj ankaŭ al najbaraj landoj. Nenio pli, eĉ movadeto ne ekzistas tiurilate. Pri tiaj projektoj eblas legi en verkoj (Svadost, Szerdahelyi k.a.), kiuj traktas la problemon de IL. *E-gazetoj mencias foje* kelkajn el tiuj projektoj, prefere en lingvistikaj temoj, kaj okaze de certaj jubileoj (Volapuko centjara). La praktiko montris, ke nia mondvasta movado estas ofte malagrable ĝenata pro tiaj projektoj, kiel ajn senmovadaj ili estas: ilia nura ekzisto bedaŭrinde konfuzas magistratojn, politikistojn kaj aliajn decidkapablajn personojn. Aludante al „aliaj lingvoj" ili evitas-rifuzas bonvenajn paŝojn, „ĝis venkos iu inter ili". La grandioza ideo do ne permesas dissplitiĝon de internacilingvanoj, ĉar la homaro ne emas subteni plurajn tiajn lingvojn. Tion ni devas konscii, se ni ne volas malfortigi la movadon de IL. La historio de Eo konas plurajn tre gravajn damaĝojn, kiujn kaŭzis stranga-malica konduto flanke de adeptoj de similaj lingvoprojektoj, tamensen profito por ili!

Al pluraj legantoj. Kiel en nia pasinta numero ni jam skribis pri tio, nia Redakcio ne havas plentempajn kunlaborantojn. La membroj de la Redakcio faras sian laboron honorofice, nur la Redaktoro ricevas por sia laboro partotempan salajron, adekvatan por ĉ. kvarono de la norma labortempo. Tial ni ne havas eblon fari vastan korespondadon kun niaj legantoj kaj eksteraj kunlaborantoj. Tamen, ĉiu alsendita letero estas atente legata, kaj ni zorge konsideras la rimarkojn ricevitajn. Eĉ pli atente ni legas ĉiun alsenditan kontribuaĵon, kaj se ĝi laŭ temo kaj nivelo taŭgas por HV, ni aperigas ĝin, sed mankas al ni tempo kaj fortoj verki detalajn kritikojn. Se iam nia abonantaro plurobliĝos, certe ni havos eblon ankaŭ por tio...

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Arta redaktoro: **Oszkár Böhm.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István Laszló, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, Józsefnádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de HEA 85 – **0215**
Indexszám 25 377 ISSN 0018–7704

ALVOKO AL GEJUNULOJ

Ni citas la du lastajn versojn el „La perfidita juno", poemo de *William Auld,* ĉe la randoj de nia krucenigmo. Tiujn versojn – en la linioj **H.1.** kaj **V.24.** – post kiam vi solvis, bonvolu sendi al nia redakcio, kiu lotumos premiojn inter vi.

Limdato: unu monato post la alveno de la revuo.



Horizontale: **13.** Agrable, gajige distras; **14.** Kora inklino (R); **15.** Malŝpari, forneniigi (R); **16.** Aktualan; **17.** Ekbatali (R); **19.** Ringoforma insulo en Korala maro (R); **20.** Korta naĝbirdo (R); **21.** Fosilia konko (R); **23.** Ridu ĉe la fino! ; **24.** Konjunkcio; **25.** Entomologia Rondo Esperantista; **26.** Ies intimulo (R); **28.** Prepozicio; **29.** Lokon montra sufikso; **30.** Mense prezentas al si bildojn, fantaziojn; **32.** Loĝanto de Eŭropa lando (R); **34.** Konstruelementoj; **35.** E-pioniro en Hungario, propagandisto, redaktoro (Aŭgusto, 1883-1955); **37.** Reen: valormetalon; **39.** Verba finaĵo; **40.** Simbolo de grava nombro, greka litero; **41.** Sovaĝa porko; **42.** Religiaj bildoj de grek-ortodoksuloj; **44.** Arbofaligilo; **46.** Metalnajlo, por kunigi pecojn (R); **47.** Tuto de organizita agado iucele; **48.** VT; **49.** Loka Komitato; **51.** Reen: perpendikla; **53.** Naskito, posteulo; **54.** Rivero hispane; **55.** Fil' de filo; **57.** Dekoracio; **59.** Mez-Eŭropa ĉefurbo; **60.** Ien sin movis; **62.** Maŝino por engrundigi foston, ŝtonon k.a.; **63.** Angla mallongigo de estinta militista organizo en Azio; **65.** Ruslando; **67.** Turka asocio; **68.** Kaŭzoj.

Vertikale: **1.** Fama heroino en romano de Emile Zola; **2.** Ŝirmitaj de infekta malsano; **3.** Ne oldaj; **4.** Utiligi rimedon; **5.** Radiko de V.1.; **6.** Verba finaĵo; **7.** Mallongigo de Atlantika militista organizo; **8.** Eliĝas radioj; **9.** Lirikaĵ'; **10.** Poseda pronomo; **11.** Ekzisti; **12.** ...Janeiro; **17.** Tre amos; **18.** Parto de ekimozo! ; **21.** Anoj de islama popolo; **22.** Konforma al iu modelo; **25.** Inklina; **27.** Kalka mara produktaĵo; **30.** Karakterizata per kaŝe moka dirmaniero; **31.** Reen: konjunkcio; **33.** Rando de buŝo; **34.** Reĝ-seĝ'; **35.** Japana sidanto sur V.34.; **36.** Centra rondo; **38.** Numeralo; **40.** Strat-kovraĵo; **43.** Eŭropa virnomo; **44.** „...mia kor'! "; **45.** Iama planlingvo; **47.** Ne jare, sed...; **48.** Bonan inklinon de la karaktero; **50.** Mitologia, homkapa virbov'; **52.** Identaj konsonantoj; **54.** Tio, kio efektive ekzistas; **56.** Italia urbo, kun oblikva turo; **58.** Kore ŝatas; **59.** Feliĉega (precipe en religio, R); **61.** Studenta Interlingvistika Seminario; **63.** ...gulti; **64.** Interjekcio; **66.** Komparativo; **68.** Reen: numeralo.

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1985/1:

Ŝuldo ne bruas, tamen dormon detruas.
Ŝparu groŝon – vi havos plenan poŝon.
(Zamenhof: Proverbaro Esperanta)

Premion gajnis per lotumado: Cvi *Lőwenkopf,* Emek Hagarden, Israelo; Angelos *Tsirimokos,* Bruselo, B; kaj Wojciech J. *Usakiewicz,* Varsovio, PL.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Eŭlalia
de
Lorjak

Se vi deziras bone amuziĝi legante parodion de famaj melodramaj verkoj, legu la originalan Esperantan romanon de Lorjak „Eŭlalia". La humura kaj atentokapta enhavo de la romano ravos vin.

1. Kio estas la moknomo de Hipolit Eratur, la submastro?
2. Kio estis skribita sur la dorso de la fotobildo, kiun ricevis Brisuker, la ministro de la nacia produktado?
3. Kiu gvidis inspektoron Leonard al Jules?

Limdato por respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1985/1:

1. Sur la medikamento de la doktoro estis skribita: „Tenu la botelon bone fermita! "
2. Otto petis la onklinon ekstari, ĉar li deziris vidi, ĉu ŝi vere sidas sur amaso da mono.
3. Benno ne povis ekdormi en la gastejo, ĉar Georg daŭre ronkis.

Premion gajnis per lotumado: d-ro *Csiki* Vidor, Miskolc, H; Magnus *Weisflog,* Scheibenberg, GDR.

La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

En la n-ro 1985/4 ni ĉerpos demandojn el „Febro" de István Nemere, en la n-ro 1985/5 el „La Monto" de la sama aŭtoro.

Se Vi gastos en Budapeŝto,
gastu ĉe Budapest TOURIST!

Laù Viaj pretendoj kaj plaĉo
ni organizas Vian tranoktadon – kaj Vi povas loĝi, ripozi, ferii

– en *Hotel Európa* kun verda zono. Jen 133 dulitaj, 20 unulitaj ĉambroj kaj 5 apartamentoj staras je la dispono de la gastoj. Unuaklasaj restoracio, vintrinkejo, kafejo, nokta amuzejo kaj tenisludejo certigas diversajn eblojn amuziĝi.
– malmultekosta, tamen komforta tranoktejo proponas sin en *Hotel Citadella* situanta sur la „supro" de Budapeŝto, en la citadelo. La rekonstruita turista hotelo kun ĝiaj du-, kvar- kaj plurlitaj ĉambroj atendas unuavice gejunulojn kaj studentojn.
– en *Vénusz Motel,* kiu troviĝas en silenta ĉirkaùaĵo. La altnivela motelo proponas 76 dulitajn ĉambrojn kaj 3 apartamentojn por la gastoj en ĉiuj sezonoj.
– intima, hejmeca etoso, societkunvenoj en *Hotel Party* sur la bordo de Danubo, en la ripozregiono de la metropolo. Kun 16 dulitaj ĉambroj meze de mirinda naturparko ĝi certigas ĉiujn kondiĉojn por la ŝatantoj de la akvaj sportoj.
– kaj se Vi vizitos nin somere, ni volonte tranoktigos Vin kaj Viajn gastojn en niaj kampadejoj establitaj per ĉiuj komfortaĵoj en la
kampadejo ĉe Romia Banejo (nomo estas omeno: jam la antikvaj romianoj havis eĉ se ne kampadejon, tamen grandiozan banejon en ĉi tiu limesa „fortikaĵo" de Panonio)
aù en la *kampadejo sur la monto Hárs,* ĉirkaùata de montaroj-arbaroj for de ĉiuj grandurbaj bruoj, tamen alveturebla el la koro de la metropolo dum apenaù duonhoro (per aùto eĉ pli rapide...)

Privataj tranoktejoj de Budapest TOURIST – de la luksa ĝis la modesta, tamen fidinda komforto.

Turnu Vin al niaj oficejoj en Budapeŝto:

Budapest, Szentháromság u. 5. (Fortikaĵo), H-1014
Telefono: 360–357

Budapest, Flórián téri üzletközpont (Komerca centro sur placo Flórián), H-1033
Telefono: 686–661

Budapest, Hímző u. 10. (Békásmegyer), H-1039
Telefono: 684–210

Budapest, Árpád út 75. H-1042
Telefonoj: 694–638, 696–406

Budapest, Roosevelt tér 5. (Ĉefoficejo), H-1051
Telefono: 173–555

Budapest, Lenin krt. 41. H-1073
Telefonoj: 426–521, 223–827

Budapest, Klauzál u. 1. H-1072
Telefonoj: 228–848, 229–286

Budapest, Blaha Lujza tér 1. H-1072
Telefonoj: 228–848, 229–286

Budapest, Blaha Lujza tér 1. (Magazeno Corvin) H-1085
Telefono: 343–150

Budapest, Baross tér 3. H-1087
Telefonoj: 336–587, 136–688

Budapest, Bartók Béla út 42. H-1111
Telefonoj: 666–194, 868–994

Budapest, Vegyész út 1-5. H-1116
Telefono: 869–269

Budapest, Déli pályaudvar (Suda stacidomo) H-1122
Telefonoj: 154–296, 353–788

Budapest, Marx téri aluljáró (Subtrairejo ĉe placo Marx), H-1132
Telefono: 324–911

Budapest TOURIST, vojaĝoficejo de Budapeŝto, zorgas pri la certigo de Via tranoktejo en Budapeŝto, sur la nivelo kaj kontraŭ la prezo – laŭ Via postulo!

GASTU ĈE NI!

VIA DOMMASTRO EN BUDAPEŜTO:
BUDAPEST TOURIST

La vojaĝoficejo de l'ĉefurbo

Budapest TOURIST

Uzu niajn servojn

- organizado de grupoj vojaĝoj
- organizado kaj aranĝado de kongresaj vojaĝoj
- organizado de vojaĝoj
- entreprenoj kaj premiaj vojaĝoj
- interpretistaj servoj
- servo de privataj ĉambroj

IDEGEN-
FORGALOM

Turisma
Propaganda kaj
Eldona
Entrepreno

Magyar Konyha

UTAZÁSI MAGAZIN
Túrázás · Szórakozás · Üdülés

NIMRÓD

jó utat
autós magazin

Autósélet
A MAGYAR AUTÓKLUB LAPJA

NR NIMRÓD rejtvényújság

Magyar Hírek